



4*5 · 1985

Starto

**ORGANO DE
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



MODERNA HOTELO · PANORAMA · PRAHA



KURACA SANATORIO J. FUČÍK
TEPLICE V ČECHÁCH

NOVA KURACA DOMO PRO MALSANOJ
DE LA MOVEBLAJ ORGANAROJ



BALNEA

INFORMOJ SENDOS KAJ CERTIGOS
KURACADON

BALNEA, reprezentace československých
lázní a zříděl,

110 01 Praha 1, Pařížská 11, telefon: 26 37 77, telex: 122 215



Ni prezentas ankoraŭ kelkajn paroladojn el la ĉi-jara renkontigo de pacdefendantoj en Pardubice.

Docento MUDr. Jiří Kovář, CSc., prezidanto de Distrikta Pac-konsilio.

Estimataj kaj karaj eksterlandanoj, estimataj gekamara-
doj, karaj amikoj,

permesu al mi, ke en nomo de Distrikte Pac-Konsilantaro en Pardubice mi bonvenigu vin kore kaj deziru al vi dum via traktado multan sukceson. Viaj traktadoj koncernos ĉefe problemojn, kiuj zorgigas ĉiujn honestajn kaj pacamajn homojn sur nia planedo, nome, kiel konservi pacon kaj sekurigi kontentan kaj trankvilan vivon al milionoj da logantoj. Mi kredas, ke je fino de via traktado vi interkonsentigos je definitiva formulo de la rezolucio, en kiu audiĝos via energia protesto kontraŭ la freneza armado, kontraŭ uzo de armiloj de amasa detrudo kaj kontraŭ ĉiaj formoj de subpremado de malgrandaj nacioj kaj limigado de ilia libera ekzistado.

Permesu al mi, ke en via ĉeesto mi povu esprimi ankaŭ mian opinion pri la problemaro. Mi estas kuracisto-kirurgo kaj mian laboron mi ŝate faras konsciante, ke mi helpas al suferantaj homoj. Dum la tempo de la nazia okupacio, en tiel nomata totala lokigo, mi spertis perversecon de la nazismo kaj en la jaro 1953 fine de la korea milito, jam kiel kuracisto, mi ekkonis sekvojn de teruro en moderna milito. Dum la tempo de mia kirurgia praktikado multfoje mi fieris pri rezultoj de mia aktiveco kaj denove alifoje mi spertis amaron de malvenko, kiam pro malpreciza diagnozo mi perdis mian pacientop. Tia estas la vivo de ĉiu kirurgo. Al tiu mi gvidas ankaŭ miajn kunlaborantojn kaj studentojn. Ni ĉiuj scias, ke en ĉiuj profesioj la gevolitaj sekvoj ne estas allasataj nur tiam, se ni konas kaŭzojn, el kiuj ili estigas.

Ankaŭ la homaro de nia planego analizu kaŭzojn de militoj kaj konsekvence batalu kontraŭ ili. Mi opinias, ke miaj nacioj faris tion honeste. En ĉiuj forumoj proklamas niaj reprezentantoj postulojn pri senarmigo, pri malpermeso de atomarmiloj kaj pri paco. La maljusta munkena diktaĵo pri ni kaj sen nia ĉeesto, humiligo de nia nacio dum la okupacio, centmiloj da mortigitoj kaj turmentitoj en koncentrejoj, detruinta ekonomio de nia ŝtato, cinika traktado de la homaj rajtoj far faŝismo estas pli ol sufiĉa kaŭzo, por ke nia popolo alrigardu al ĉi tiuj fundamentaj problemoj de sia ekzistado tre atente. Neniu povas miri, ke ĝian sorton ni ligis kun Soveta Unio, kiu unusola vokis antaŭ la dua mondmilito pri la kolektiva defendo kontraŭ faŝismo, kiu perdis dudek milionojn da civitanoj kaj trovis sian landon post la milito dezertigitan, kiu unusola estis decidiginta plenumi siajn aliancajn devontigojn al ni ankaŭ en la tempo, kiam niaj okcidentaj

aliancanoj en tempo de Munkeno simple nin strekis. Kun Sovietio ligas nin armil-amikeco en la dua mondmilito, la sama ideologio baziganta sur la principoj de marks-leninismo kaj la proleta internaciismo.

Ni estas konvinkitaj, ke Eŭropo dum plenaj kvardek jaroj ne travivis la militan furiozadon dank al Sovet-Unio kaj de la ceteraj socialismaj ŝtatoj. Kiu nur teorie konatigas kun pensoj de nia ideologio, devas mem alveni al konvinko, ke socialismon kaj feliceton de homoj eblas konstruadi nur dum paco kaj paco estas do kondico de plua evoluo de la homa socio. El tio fontas nia rezisto kontraŭ kiu ajn perforto inter nacioj, kontraŭ milito, kiu alportas ciam grandegan suferon kaj reirigas la homaron morale kaj ekonomie por longaj jaroj.

Kiam mi aĝis dek du jarojn kaj frekventis la duan jaron gimnazion, el nia klaso estis elvokita samklasano Rudolf Gans kaj en transporto kun siaj gepatroj forveturigita al getto en Terezín. Post kelkaj monatoj venis lia letero, en kiu li adiauis kun ni, ĉar lau sorto de aliaj juddevenaj arestitoj li ekkonis, kio lin atendas. Lian nekompreneman KIAL en lia lasta letero sencese mi rememorigas al mi. La saman KIAL donadis al si infanoj kaj homoj en Lidice, viroj kaj virinoj el Ležáky kaj la ceteraj forbruligitaj vilagoj de nia lando. Konstante mi vidas du mil georfojn en korea urbo Kesong, kiuj estis kunvenigitaj al iu lernejo kun frakasitaj fenestroj post bombagado kaj kien mi venadis por ilin kuraci kaj perkuti. Ankaŭ ili demandis en sia animo KIAL. Ekde tiu tempo ĉi tiun demandon certe donadis al si miloj da pluj senkulpaj infanoj, kies gepatroj falis en la vjetnama milito, en Libano kaj pluj absurdaj militoj en Azio, Falklandaj Insuloj, Grenado kaj aliloke. KIAL? Ĉar je milito kaj armado gajnas grandegajn sumojn tiuj, kiuj kutime en milito ne riskas siajn vivojn kaj kies infamoj tial ne orfigas.

Nia socio investas enormajn sumojn je la senpaga zorgado pri sano de nia popolo. Ni batalas pri vivoj de peze kaj ofte senespere malsanaj homoj, ni strebas almenaŭ faciligi al ili ilian suferadon. Milito sencense kripligas kaj mortigas sanajn, junajn homojn, senkulpajn virinojn kaj infanojn. Tial mi kalkulas min al aktivaj pacdefendantoj kaj esprimas mian reziston kontraŭ kia ajn perforto, subpremado de la homaj rajtoj kaj liberecoj kaj rasa diskriminacio. Tial kun timo mi sekvas vigadon de revengismo en kelkaj landoj, penadon revizii limojn en Eŭropo, revizii interkonsentojn de konferencoj en Jalto kaj Potsdamo. Nia tasko estas alarigi la konsciencon de l homoj kaj umuigadi ilin al la kontraumilita strebado, ke neniam plu en la estonteco senkulpaj viktimoj demandu KIAL.

Ni batalu kontraŭ milito, dum ankoraŭ ĝi ne estiĝis. Mi finas per testamento de Fuĉik "Homoj viglu" kaj mi dankas al vi por la atemo.

Dimitrij Aleksandrovič PEREVALOV. delegito de Sovet-Unio.

En la nomo de sovetia MEM sekcio kaj prezidio de sovetiaj esperantistoj kaj ankaŭ en la nomo de Moskva centra esperanto-klubo mi salutas la mastrojn kaj ĉiujn partoprenantojn de la jam tradicia sepa renkontiĝo de pacdefendantoj en Pardubice.

La sovetiaj esperantistoj efektive faras tre aktivan agadon por defendi la pacon. Nu, jen kelkaj ekzemploj. Esperanto-klubo en Samarkand tre ofte organizas diversajn ekspoziciojn de afiŝoj porpacaj kaj de infandeseĝnaĵoj. Same faras la kluboj en Rostov/Don, Krasnojarsk, Barnaul, Vladivostok kaj aliaj. Ekzemple esperantistoj en urbo Kujbyŝev surbaze de la jam konata albumo Hiroŝima-Nagasaki faris la etan filmon kaj prezentas ĝin en diversaj vojaĝoj tra la regiono. Ili organizas agitbrigadon porpacan, faras tre multajn diversajn farojn.

Ĉe ni en la kluboj okazas multaj mitingoj de la solidareco kum la popoloj, kiuj luktas kontraŭ agresoj de la imperalismo, ekzemple tio estis pri eventoj en Grenado, Libano, Ni-karaguo.

Multaj kluboj organizas labortagojn kaj en la urboj kaj jam tradicie en diversaj tendaroj kaj perlaboritan monon el tiuj ĉi labortagoj oni transdonas al la sovetia pacfonduso. Ekzemple en Moskvo oni organizas kelkajn labortagojn kaj por perlaborita mono eldonis tiun ĉi faldaĵon kontraŭ la disvastigo de nukleaj militoj. Tiun ĉi alvokon de la Centra Komitato de nia partio kaj de Supera Soveto de SSSR al la parlamentoj, registaroj kaj partioj kaj popoloj de la mondo - ni eldonis por la mono de Centra Moskva Esperanto-klubo. Ĝin helpis kaj partoprenis en ĝia dissendado al esperantistoj ankaŭ multaj Esperanto-kluboj en nia lando.

Mi dum lastaj jaroj pli malpli regule eldonas porpacajn materialojn, tiujn, kiel ekzemple estis "Defendi la pacon, preventi nuklean militon", "Nova minaco al Eŭropo" kaj aliaj.

Mi ricevas multajn reĝojn - eldonejo de Novosti kaj Asocio de sovetiaj esperantistoj - de eksterlandaj esperantistoj ankaŭ el Ĉeĥoslovakio kaj venas ankaŭ tre multaj el kapitalismaj landoj. Precipe pri tiuj du lastaj broŝuroj. Mi petas vin ĉiujn, aktive reĝi al eldonaĵoj, car ni vidas, ke niaj broŝuroj estas legataj kaj fakte servas al la paco.

Post kelkaj semajnoj mi eldonos du gravajn eldonaĵojn, sub titoloj "Ni, infanoj, neniam spertu la terurojn de milito", kiu rakontas pri la agado de virinoj koncerne la pacon kaj grandformata faldaĵo "La venko".

Mun unu el la plej gravaj taskoj de ĉiuj pacbatalantoj esperantistoj estas lukti kontraŭ la vetarmadg kaj dislokado de Usonaj mezdistancaj raketoj en okcidenta Eŭropo. Beĝaurinde, vi jam scias, ke la dislokado komenciĝis. Jam antaŭ nelonge mi ricevis revuon el Belgio kaj tie ili intencis organizi manifestaciojn apud la usona bazo en Floran. Sed antaŭ kelkaj tagoj ni eksciis, ke en tiu bazo oni jam komencis dislokadon de tiuj raketoj. Tio signifas, ke pacagado de pacfortoj estas

aktiva, forta, sed nesufiĉa ankoraŭ por ne permesi al imperi-
istoj fari tiel, kiel ili volas. Ĉu pro tio ni devas mallevi
manojn kaj ne plu batali por la paco, se ni vidas, ke nia ag-
do ne tiom efikas, kiom ni volus? Male, ni devas nur ankoraŭ
pli aktive agadi, streĉi miajn fortojn, mobilizi niajn fortojn
kaj tiam ni povas atingi sukcesojn.

Unue nia tasko estas ankau demaskigo de la provoj kulpigi
same Sovet-Union kaj Usonon pri la vetarmado, kulpigi same
landojn de Varsovia kontrakto kaj tiujn de NATO, car necesas
nur preni faktojn kaj konsulti la faktojn kaj oni povas vidi,
kiu vere kulpas pri la vetarmado. Kaj ekzemple bone tion videb-
ligas nia broŝuro "Nova minaco al Europo - Kiu kulpas?", car
tie oni vere vidas tion.


Antau kelkaj tagoj en Moskvo finiĝis kunsido de prezidio
de la Monda Packonsilio, kiu alvokis ĉiujn pacbatalantojn pli
aktive agadi des pli, ke ĉi jare okazas kelkaj datrevenoj gra-
vaj: 40-jariĝo de la venko, 40-jariĝo de Unuigintaj Nacioj,
10-jariĝo de la konferenco en Helsinki, nuna jaro estas jaro
de junularo ktp. La Monda Packonsilio akceptis du alvokojn
sub la titoloj "La jaro de la 40-a datreveno de la venko super
la germana fasismo igu la jaro de la venko super la minaco de
la nuklea milito kaj ne jaro de stelaj militoj", car ankaŭ tre
dangeras al ni vetarmado, kiu povas okazi en la kosmo.

Mi opinias, ke nia renkontiĝo devas ankau aprobi alvokon
de MPK kaj agadi ankaŭ guste lau tiuj direktoj, kiujn difinis
la MPK.

Kaj ĉi jare okazos en Moskvo la XII-a tutmonda festivalo
de studentoj kaj de junularo. Kaj ni certe volas vidi tie mul-
te da esperantistoj. Do mi petas vin, ĉiujn asociojn, fari kon-
venajn paŝojn ĉi rilate, ke esperantistoj ankaŭ okazu en la na-
ciaj delegitaroj, kiel jam faris ekzemple niaj hungaraj ami-
koj. Mi jam eldonis koloran fotogazeton "Sovetia junularo pre-
parigas al la festivalo. "Ankoraŭ baldaŭ aperos unu broŝuro
pri la festivalo. Do, mi petas uzi la festivalon ankoraŭ kiel
unu rimedo por plifirmigi la pacon kaj aktive partopreni en
ĉiuj arangoj de ĝi. Oni povas partopreni ankaŭ ne nur en Mosk-
vo, sed ankaŭ en prepara periodo en siaj landoj.

Mi volas ankoraŭ foje danki al organizantoj de la renkon-
tiĝo kaj transdoni al ili malgrandan donaceton, kiu temas pri
la homo kaj universo. Pro tio, ke oni povas vidi, kiel bela
estas nia tergloblo el kosmo kaj tiel despli aktive batali, por
ke ĝi ne eksplodu!

Prezidantino de EK DUKLA M. Hemerková transprenis la dona-
con kaj dankis al s-ano Perevalov en nomo de E-klubo Dukla.



Esperantistino el Potsdam:

Tre estimataj gesinjoroj, unue mi deziras esprimi la elkoran dankon por la invito al tiu ĉi grava renkontiĝo, ne nur en la nomo de la dek ĉi tie estantaj partoprenantoj, sed ankaŭ de la esperantistaro de distrikto Potsdam.

Samtempe mi volas esprimi mian egan deziron, ke tiu ĉi arango donu al ni ĉiam plian forton por batalo por paco kaj vivo, por evoluo de la homaro. Mi volas fari ĉion eblan, por ke ni ne bezonu diri ANKORAŬ ESTAS PACO, sed DAŬRA, kiel hieraŭ dum kulturprogramo tiel insiste esprimis samideanino Seemannová.

Ankaŭ la geesperantistoj el nia distrikto uzas nian komunan lingvon en la servo de la paco kaj kiel rimedo por interkomprenigo de la popoloj. Kelkajn ekzemplojn. En la pasinta tempo mi tradukis prospekton pri la sama fasista koncentrejo Sachsenhausen. Kaj ni sendis pli ol 500 ekzemplerojn eksterlanden. Al niaj korespondamiko kaj al gravaj organizaĵoj. En tiu ĉi jaro ni tradukis okaze de la kvardeka datreveno de la venko kaj de la liberigo de fasismo prospekton pri la konferenco en Potsdamo en la kastelo Cecilienhof. Kiam ĝi estos preta, ni forsendos ankaŭ tiujn ĉi ekzemplerojn eksterlanden.

Mi uzis kaj uzas nian korespondadon kun geesperantistoj en la mondo ankaŭ por interŝangi spertojn pri eblecoj por plifortigi mian batalon kontraŭ la nuklea minaco.

Mun mi havas belan kaj honorigan komision transdoni al la sepa paca renkontiĝo bildkolektaĵon pri la 40 pasintaj jaroj de Potsdam. Antaŭ kvardek jaroj en aprilo 1945 grandaj partoj de Potsdam estis detruitaj en kelkminuta bombardado. La bildkolektaĵo rakontas pri tiu terura detruo kaj ankaŭ pri la novkonstruado de la urbo Potsdam, kiu intertempe farigis bela kaj vidinda urbo.

Ĉeĥa esperantistino:

Mi volas konatigi vin kun deklaro de japana gubernio KANAGAWA kontraŭ nukleaj armiloj. Mi ricevis ĝin de mia japana korespondantino Mikiko Jamamoto de la japana urbo Jokohamo. La deklaro estis aprobita la 5.7.1984 de la asembleo de la gubernio Kanagawa. Tiu ĉi gubernio havas multajn militbazojn de Usono kaj interalie en la haveno de Jokosuka lastatempe ankris la militŝipo, kiu povus porti la nuklean armilon TOMAHAWK. En tia cirkonstanco multaj urbanaj grupoj kolektis ĉirkaŭ unu milionon kvarcent mil subskribojn, kiuj esprimis sian malaprobon kontraŭ tomahoko kaj sian aprobon al la gubernia deklaro.

La Esperanto-rondo en la urbo Jokohama decidis sendi la esperantigitan tekston al siaj korespondantoj por pli bone konigi la deklaron al la mondo. Kaj nun la teksto de la deklaro:

LA DEKLARO DE LA GUBERNIO KANAGAWA KONTRAŬ NUKLEAJ ARMILOJ.

La abolicio de nukleaj armiloj kaj realigo de la eterna paco estas sincera deziro komuna de ĉiuj popoloj de Japanujo, la uĝusola lando en la mondo, suferinta pro nukleaj bomboj. Ankaŭ ni, gubernianoj de Kanagawa asertas ĉi tiun fortan dezirom de la japana popolo. Hodiaŭ kreskantaj internaciaj streĉigoj pro plifortigo de nukleaj armiloj minacas la mondpacon kaj eĉ la travivon de la homaro. Ni ne povas ne apelacii al popoloj tra la mondo por la abolicio de nukleaj armiloj kaj por malarmado. Protekti ĉi tiun belan landon por miaj infanoj kaj nepoj kaj postlasi al ili ĝuindam vivon estas niaj devoj. Ni, la gubernianoj de Kanagawa, tial deklaras, ke la tri sen-nukleaj principoj

- ne posedi
- ne fabriki
- ne enlasi

nukleajn armilojn en Japanion, adoptitaj de japana registaro kiel fundamenta politiko de la nacio, farigis ankaŭ la politiko de nia gubernio.

La 5.7.1984.

Mi opinias, ke ni ĉiuj povas nur konsenti kun la enhavo de la deklaro kaj ke ni ne nur povas, sed ni devas subteni ĝin.

Drahomír KOČVARA, prezidanto de paca sekcio de ĈEA

Estimataj gesamideanoj, mi diros kelkajn vortojn pri aktiveco de nia paca sekcio en Ĉeĥoslovakio.

Unue mi treege volus danki por ĝisnuna laboro, kiun vi faris. Mi volus denove peti vin, ke ĉiu komitato en ĉiu rondeto fakte havu unu funkciulon, kiu zorgos ĝuste pri pacaj aferoj. Ĉar nunjare ni kunvokos konferencon, kie ni volos renovigi mian komitaton de paca sekcio de ĈEA kaj ni volus por estonteco ankoraŭ pli aktivigi nian laboron.

Unue mi devas menciigi pri la afero, kiu fakte estas pli ol unu jaron malnova. Sed tamen konstante aktuala. Nia aktiveco en paca laboro alportis al ni ĝis nun plej grandan sukceson, ke MEM Internacia Komitato inter sep invitatitaj personoj ankaŭ invitis kelkajn pacaktivulojn de ĈEA al MONDA ASEMBLEO POR PACO KAJ VIVO, KONTRAŬ NUKLEAJ MILITO en Prago 1983. Ŝajnas al mi, ke ni ĝis nun ne bone kaj ne ĝuste taksis la aferon. Mi travivis tiun momenton, ke mi estis ne nur pasivaj partoprenantoj, sed ĈEA estis invitita por rekta kunlaboro, do ni devis unu homon doni en preparkomitaton - tio estis nia estinta sekretario Zdenko Křimský, kiu bonege kaj brile plenumis tiun taskon reprezentante ĈEA en tiu preparkomitato. Kaj krome ni ricevis honoron prepari unu tute memstaran parton de tiu grandioza kaj ĝis tiu tempo la plej granda paca evento KOMUNIKACIO INTER LA HOMOJ! Estis nia tasko regi tiun ĉi dialogon. Estis emocia momento, kiam garantiulo Zdenko Křimský malfermis la dialogon. Estas fakto, ke ĝi okazis en la sama momento, kiam prelegis

Jásir ARAFAT. Kaj Arafat estis personeco en tiu tempo, kiu allogis la plej grandan parton de partoprenantoj. Sed tamen ĉirkaŭ 30 personoj partoprenis mian kunsidon. Nia prezidanto, kandidato de sciencoj, enkonduke faris brilan ĉefraporton pri komunikado inter homoj. Mi tre ege gojis, ke dek ok inter partoprenantoj estis esperantistoj el Anglujo, Polujo, Hungarujo, Belgio, Ĉeĥoslovakio - jes, ke komunikacio inter homoj allogis ĝuste ĉiun homon, kiu zorgis pri tiu komunikacio. Ĝojis nin, ke du triomjoj de partoprenantoj estis partoprenantoj, kiuj interesis pri la problemoj kaj ne estis esperantistoj. Tio estis por ekzemple filmregistro el Hindujo, aŭstralia funkciulo en laborista movado, fina oficistino, laboranta en socialpolitiko, dana instruistino kaj aliaj. Por ni tio fakte estis grandega sukceso, ke ni povis diskuti pri bezonoj de la mondo, ke nepre mondo bezonas - mi diru unu planitan lingvon, ke ĉiu sciu la gepatran kaj tute normale ankaŭ planitan lingvon, por ke povu interkompreni laboristo ĉeĥoslovaka kun la japana aŭ la hinda. Tio estas fakte revoluciema penso kaj tie eksomias tiuj faktoj, ke venis la momento, ke mondo bezonas tiun komunon ni diru interligilon, kiu tre helpus ĝuste nun, kiam estas tiuj minacaj nuboj sur la firmament. Ĝuste nun ni kapablus bremsi pli aktive tiujn iniciantojn de la milito, se ni fakte ne havus inter ni tiun lingvan barilon. Tion montris tiu renkontigo.

Nun mi volus diri, ke fakte ĉeĥa nia entrepreno estas ĉiam renkontigo de pacbatalantoj ĉi tie. Mi memoras, kiam ni komencis en tre modestaj kondiĉoj, kiam eatas ĉi tie en salono nur kelkaj vicoj plenaj kaj hodiaŭ - vi certe scias pri tio - ni devis limigi energie partoprenon, ĉar pasintjare preskaŭ krevis tiu ĉi salono de multego kaj ni ne kapablus organizi 750 partoprenantojn. Do tio estis ĉefa kaŭzo, kial ni devis iom limigi kaj plibonigi la ĉeestantaron. Jes, tio estas ni diru malgrandigo, sed la kvalito estas pli bona de tiuj ĉi partoprenantoj. Do ni tre fieras pri tiu ĉi renkontigo kaj ni volus, ĝis kiam daŭros danĝero milita, ni volus tiujn jam tradiciajn renkontigojn en Pardubice konstante daŭrigi.

Plue mi volus mencii pri nia organo PACO. Ĉiu ĉeĥoslovaka numero estas pli kaj pli bona, pli legebla, pli literatura, pli plaĉa. Mi fakte povas paroli pri tio, ĉar ĉiu el vi ricevis po unu lasta numero. Mi petas, uzu tiun ĉi numeron por propagando en viaj rondetoj, ĉar ni ne estas kontentaj kun nombro de abonataro, ni hodiaŭ traktos en MEM komitato, kion fari, ke tiu bonega paĝgazeto fakte eniru al pli multe da homoj en Ĉeĥoslovakio. Mi volus, ke ĉiu ĉeĥoslovaka esperantisto ricevadu ĝin, ĝi donas al vi eblecon paĉlabori. Mi nepre petas vin, ke vi post reveno el Pardubice havu tiun pacan taskon: Rakontu en via klubejo pri nia paĝgazeto PACO, montru al viaj klubanoj la lastan numeron, lasu ĝin cirkuli, gajnu novajn abonantojn. La gazeto PACO estas kurioza gazeto. Ses numerojn eldonas Bulgario kaj krom tio vi ricevas po unu numero el Japanio, el GDR, el Francio ktp. Tio tamen estas bonega propagandilo de nia internacia labore. Antaŭpagu la gazeton

PACO, estos tio via tasko, tasko sur paca tereno.

Mi volus diri al vi, aliĝu al posttagmeza dialogo. Samideanoj el Jablonec certe invitos al ĉi jara pacmarŝo. Tie ili simpleligas paclaboron kun movo en naturo. Mi kelkfoje partoprenis ĉie kaj tio fakte estas belega pacmarŝo internacia, kiu komencigas esti malgranda esperantista entrepreno. Centoj da homoj alveturas per autobusoj por partopreni la pacmarŝon en Jablonec. Mi volus, ke denove la numero alproksimigu al 500, ĝi estas malgranda paca manifestacio. Ĝin instigis kaj organizas esperantistoj el Jablonec. Brila modelo por aliaj. Mi dankas al ili por tiu laboro kaj instigas vin PARTOPRENU!

Tre grandan dankon meritas esperantistoj en Karlovy Vary, kiuj kun Schwarzenburgaj esperantistoj el Germana Demokratia Respubliko organizas ĉiujare pacrenkontigon; ĝi estas malgranda, kutime 60-70 geesperantistoj, sed la enhavo estas ĉiam fakte por ligi amikecon inter GDR kaj inter CS kaj defendi la mondan pacon. Kaj tre saĝe ili ligas tion kun movo en naturo kaj tio ĉiam estas por esperantistoj tre alloga.

Kelkajn vortojn mi volus diri pri Hiroŝima-Nagasaki. Vi aŭdis ĉi tie, ke esperantistoj filmis la libron. Ni en Ĉeĥoslovakio, dank al esperantistoj el Přerov, kiuj jam gajnis honoran titolon RONDETO de esperantistoj pacdefendantoj, havas ankaŭ tiun ĉi filmon pri la libro. Bedaurinde ekzistas ĝis nun nur unu originalo nepruntebla, ĉar ili bezonas havi ĝin nedifektita. Kaj mi esperas, ke dum la posttagmezo mi ekscios, kiam venos momento, ke ĉiu rondeto en Ĉeĥoslovakio libere povos prunti tiun ĉi filmon kaj montri ĝin ne nur al esperantista publiko, sed montri ĝin ankaŭ al indifera publiko kaj tio estas granda nia tasko, ke kontraŭmilitajn filmojn, kiuj ekzistas ĉi tie, ni disponigu al aliaj organizaĵoj. Plej bone estus, ke vidu ilin la tuta mondo.

Ni volas decidi pri la praktiko pri Vjetnamia socialisma respubliko, pri nia akcio de solidareco. Ni kapablis en nia Agocio kolekti pli ol 20 mil kronojn en estinteco kaj Esperanto ĉi tie montris tian aktivecon, jes eĉ en tiu ĉi afero ni parolos denove, je kiu direkto ni devas nun la fortojn direkti. Kie estus la plej bezonata nia helpo.

Ankaŭ mi devas mencii, ke treege grava estas, kaj vi ĉiuj sentis tion hierau dum nia kultura programo, doni pacideojn en poeziojn, doni ilin en kantojn, doni ilin rekte en unuaktaĵojn, teatraĵojn. Sur tiu ĉi kampo fakte ni en Ĉeĥoslovakio dankas al sinjorino Eva SEEMANNOVÁ. Samideanoj el nia literatura sekcio en frunĝo kun prezidento faris jam multege da laboro kaj mi treege ĝojas, ke ili ankoraŭ multe faros en estonteco, ĉar tio estas ĝuste bona direkto, kiu facile eniras la koron de ĉiu homo, kiu estas sentema kaj tiajn homojn ni bezonas, kiuj havas koron fakte por la pacaj ideoj malfermita.

Je la fino mi nur volus diri, ke en posttagmeza dialogo certe ni aŭdos multajn iniciativojn el viaj vicoj kaj ke ni poste pritraktos ilin tuj dum nia komitata kunveno. Do via aktiveco, viaj proponoj estos por ni, ni diru, tia direktilo, kiu gvidos nian laboron.

Mi dezirus, ke ne nur urbo Mělník, Bor u Tachova kaj Pardubice, Pířbram kaj Přerov havu la titolon Rondetoj kaj kluboj de pacdefendantoj, sed ke plilongigu tiu vico de la rondetoj kaj je la fino mi volus, ke tiun ĉi honoran titolon gajnu Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

Esperanto-Asocio de GDR honorigis s-anon Zdenko Křimský per honorinsigno kaj ĉeokaze la delegito el GDR, s-ano Jürg Kelpin, voĉlegis leteron de EAGDR al s-ano Křimský:

Estimata kamarado kaj pacamiko Zdenko Křimský !
La prezidio de Esperanto Asocio en Kulturligo de GDR decidis distingi vin per la honorinsigno de GDR. Per tiu distingo nia Asocio volas danki Vin por viaj grandaj personaj meritoj ĉe la pliprofundigo de la amikeco kaj kunlaboro inter la esperantistoj de niaj du landoj kaj por via kontinua porpaca agado. Nia Asocio tre ŝatis vian konstruktivan kunlaboron, ĉar vi ĉiam defendis la klarajn poziciojn de internaciismo, de socialismo kaj de la mondopaca esperantista movado. Ni esperas pri bona kunlaboro ankaŭ estonte.

Subskribis prezidanto Hans Heiner kaj sekretario d-ro D.Blanke.

FI E R A B I L A N C O

En la 4-5a n-ro de Heroldo de Esperanto ageris listo de Zamenhof- au Esperanto- stratoj kaj placoj. Lau la listo en 4 kontinentoj, en 29 landoj, ĵentute 459 stratoj, placoj kaj monumentoj estis nomitaj lau Zamenhof au Esperanto. Sed eg kiuĵ kazoj ekzistas duboj, ĉu la placoj kaj stratoj ankoraŭ portas la Esperantajn momojn, au ĉu iuj momoj en la listo mankas. Tial mi represas la momojn, koncernantajn Ĉeĥoslovakion kaj petas miajn legantojn kontroli la listojn kaj sciigi al la redakcio de Starto eventualajn ŝanĝojn au kompletigojn. Jen la listo de la ĉeĥoslovakaj E-stratoj kaj placoj lau Heroldo:

1.	Bohumín	Esperanto-bulvardo	inaŭgurita en j.1951
2.	Bohumín	Esperanto-muzeo	1965
3.	Bor		
4.	Bratislava		
5.	Doksy		
6.	Drahovice	Esperanto-strato	1926
7.	Hradec Králové	Zamenhof-strato	1949
8.	Kopřivnice	Zamenhof-monumento	24.9.1950
9.	Lázně Bělohrad		
10.	Nové Zámky	Zamenhof-strato	
11.	Olomouc	Zamenhof-strato	1932
12.	Ostrava-Zábřeh	Zamenhof-monumenta	11.4.1952
13.	Trutnov	Esperanto-strato	
14.	Příbor	Esperanto-monumento	

Ni estos dankemaj pro viaj ĝustigoj kaj kompletigoj, kiuĵn ni transdonos al la kompilinto de la listo s-ano H.Röllinger.

Bildo el eŭropa historio

La unuan artefaritan lingvon por eŭropanoj kreis bizanciaj apostoloj Cirilo kaj Metodio. Ne multaj scias, ke Slavono bazigas sur unua artefarita lingvo eŭropa, far de apostoloj. Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto sur paĝo 1106 klarigas la vorton Slavono, ke ĝi estas religia lingvo, devenanta el la malmova bulgara kaj uzata de la rusortodoksaj eklezioj. Sed vojo ekde artefarita lingvo de la apostoloj ĝis lingvo Slavono daŭras kelke da centjaroj.

La lingvon "Praslavono" apostoloj kreis sur bazo de la sudslava, malmovbulgara dialekto, kiun tiatempe oni uzadis en la cirkauaĵo de la urbo Tesaloniko. Al tiu ĉi artefarita lingvo donis baptonace la apostoloj, ke ĝi neniam servu por uzado en la vivo praktika, ke ĝi servu nur kiel lingvo eklezia en la lando, kiun la historistoj de la 19-a jarcento eknomis Granda Moravio. La artefarita lingvo ekestis sub influo de la greka civilizacia medio, kaj kiel oni prezentis, devene ĝi estis fiksita nur por oficiala eklezia literaturo. Sed kontraŭ volo de la apostoloj, la lingvo apud la eklezia rolo oficiala komencis ankaŭ ludi rolon de la lingvo oficiala kaj literatura por plimulto da Slavoj.

Lingvo Praslavono en naŭa kaj en deka centjaroj ampleksis ne nur elementojn de iama dialekto el cirkauaĵo de Tesaloniko, sed multajn elementojn el okcident-slava lingvoj, trans kies teritoriojn ĝi "transmarsiĝ" per helpo de la grandmoraviaj pastroj kaj instruistoj kaj ĝi igis unuiga fenomeno lingva de ĉiuj Slavoj. Okazis afero, ke artefarita lingvo igis ankaŭ bona ilo kaj armilo kontraŭ praimperialismaj manieroj praktikitaj en nomo de tiatempa ideologio, de la komencanta mezepoko.

Bedaurinde, ĝis nuna tempo estis al ni konservitaj nur torsoj de la literaturo /Praslavone skribita kaj verkita/ en tiel nomataj Pražske hlaholske zlomky = esperante: Glagoliceaj fragmentoj de Prago, kiujn posedas arkivo de la Praga kastelo reĝa kaj tiel en nomataj Folioj el Kievo, kiujn evidente posedas iu muzeo de ukraina ĉefurbo.

Ekestis demando, kial ne estis pli multe da literaturo en Praslavono ĝis nuna tempo konservita, kiam oni generale scias, ke Slavoj estas ŝatantoj de la literaturo, de la libroj kaj de ĉioma belarto generale.

La afero estis tre trista, ĉar en la jaro 906 disfalis regno nomita Granda Moravio, lernantoj kaj favorantoj de la apostoloj estis persekutitaj, parte ili eskapis Ruslandon, Bizancion, Bulgarion, parte ili estis mortigitaj kaj ĉiuj libroj trovitaj sur teritorio de disfalita Granda Moravio forbrulis sur stiparoj de okcidenteŭropaj kulturtregroj.

La lastan eksperimenton revivigi la lingvon kaj la originan slavan ceremonion eklezian, faris la plej saga reĝo ĉeĥa Karlo la IV-a, kiam li en la jaro 1347 fondis monaĥejon en Prago, nomitan Emauza Monaĥejo - ofte oni ĝin ankaŭ nomis Slava Monaĥejo de Prago /la 14-an de februaro 1945 ĝi estis bombardita kaj preskau ruinigita/.

Post la disfalo de la Granda Moravio ne eblas jam plu paroli pri la origina lingvo Praslawono de la apostoloj, ĉar ĝi iom-post-iom transformiĝas en lingvon, kiun oni nuntempe nomas Slavono. La Slavono igas ne nur komuna lingvo literatura, sed ankaŭ eklezia de multaj da Slavoj, ĝi ludis grandan, plimalpli fundamentan rolon ĉe la evoluo de multaj skribaj formoj de slavaj lingvoj naciaj, ekzemple: de bulgara, kroata-serba, slovena kaj rusa. Slavono, en iama Rusa Carlando /kaj ĝis nuna tempo ĝi estas uzata/ igis eklezia lingvo de la ortodoksaj kristanoj. Ĝis la nuna tempo la moderna rusa konservis en skriba formo, en gramatiko, en vorttrezoro multe da slavonismoj.

Post multaj centjaroj, sub gvido de la okcidenteŭropa ideologio forbrulis la 6-an de julio 1415 sur ŝtiparo en la germana urbo Konstanz la ĉeĥa reformatoro Majstro Jan Hus; fanatika jezuita oratoro Jan Komiáš sub gvido de kulturtregra ideologio forbruligis dum sia vivo preskau 30000 ĉeĥe skribitajn librojn - aliaj kulturtregroj ekbruligis en la jaro 1933 en Berlino la germanan parlamenton - kaj poste brulis libroj sur germanaj stratoj en faŝista Germanio - kaj forbrulis multaj homoj en fajro de la dua mondmilito.



K O R E S P O N D I D E Z I R A S



11-14-jaraj bulgaraj gelnantoj volas korespondi kun ĉeĥoslovakaj infanoj kaj ankaŭ reciproke viziti sin. Skribu al ilia instruistino Maria Petkova Slaveva, "Iskra" 22, 9700 Ŝumen, Bulgario.

32-jara japana studento volas korespondi kun ĉeĥa esperantisto, kiu studas speciale lingvistikon aŭ diversajn ligojn. Temoj de korespondado: lingvistiko, lingvoj kaj ankaŭ literaturo kaj belarto. Adreso: Hideki NOMA, Kamitome 1556-3, Miyoshi-machi, Iruma-gun, Saitama 354, Japanio.

15-jara bulgara knabino deziras korespondi kun ĉeĥaj geesperantistoj. Ŝi kolektas bildkartojn kaj scias la germanan lingvon. Milena Andreeva, Bul.Slawjanski 11 vh Asp 2 et.1, 9700 ŜUMEN, Bulgario.

SCIENC-TEĤNIKA SEKCIO DE ĈEA

Kiel jam anoncite en la antaŭaj numeroj de Starto, la Scienca-teĥnika sekcio de ĈEA preparas terminologian kurson, kiu estas okazonta inter la 1-a kaj 5-a de septembro 1986 en Roudnice n.L. Por la kurso estas eldonota speciala manlibro pritraktanta relative amplekse la plej gravajn punktojn de terminologia laboro /nocioj, propracoj de terminoj, reguloj de kreado de terminoj, normigo de terminaroj ktp./ La nombro de partoprenantoj estas limigita per 35.

En aŭgusto 1985 fondiĝis Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo:

Mondkomerca Eldonejo Esperantista,
P.O.Kesto 25041,
3001 HA ROTTERDAM,
Nederlando

Sub la gvido de s-ro H.Welling, Membro de IKEF, la nova asocio elektis, laŭ-Statute, Estraron konsistantan el kvin individuaj Membroj. La Estraro konsistas el:

S-ro F.J. Braun, /Okc.Germanio/	Prezidanto;
S-ro L.Mee, /Nederlando/	Generala Sekretario;
D-ro M. Picasso, /Italio/	Estrarano;
S-ro F.-X. Gilbert, /Francio/	Estrarano, kaj
D-ro I. Gether, /Hungario/	Estrarano.

Kopioj de la Statuto, kaj ceteraj informoj pri la agad-programo kaj -planoj de la Fakgrupo, estas haveblaj kontraŭ simpla peto al la konstanta adreso de la Fakgrupo.

Inter la konstatitaj urgaj taskoj por la Fakgrupo estas tiu de kunordigo de la aperigo de fakaj artikoloj pri la ekonomia situacio en apartaj landoj, cele al granda plioftigo de tiaj artikoloj. La Fakgrupo aparte serĉas kontaktojn kun verkontoj, promesante fakan helpon laŭpove.

En la komerca kampo, la Fakgrupo jam starigis la bazon de "peradservo", ebligante kontaktojn inter tiuj, kiuj "proponas" kaj tiuj, kiuj "serĉas", varojn de ĉiu speco. Potencaj uzontoj de tia peradservo estas simile konsilitaj sinturni al la konstanta adreso kun helpopeto.

Ankaŭ en la komerca kampo, la Estraro esploras la eblecojn plioftigi reprezentadon de Esperantistoj en specimenoj kaj aparte bonvenigus proponojn tiurilatajn.

- - -

Ree okazis sesioj de Akademio Internacia de la Sciencoj inter la 27-a de decembro 1985 kaj la 6-a de januaro 1986. Tiu internacia universitato, kun Esperanto kiel laborlingvo, estas unu el la plej promesplenaj, kiuj altigas la prestigon de Esperanto en la sciencaj medioj. (B.I.)

Laŭ oficiala invito, fine de novembro 1984 partoprenis prezidanto de la Scienca-teknika Sekcio de ĈEA, doc. Novobilský kaj membro de la sekcio ing. Zdeněk Polák, internacian seminarion en Wiesenfelden /en FRG/ sub la devizo: La vivomodio ne havas ŝtatlimojn. Organizis ĝin la Asocio de naturprotektantoj en FRG kune kun la naturprotektantoj-esperantistoj. La seminario okupiĝis precipe pri la forstmortado, kiu minacas la arbarojn en la gastiganta lando kaj en aliaj multaj europaj ŝtatoj. Fonto de la damaĝoj estas la emisioj de la industrio, kiuj malpurigas la aeron kaj kauzas ankaŭ la t.n. acidan pluvom.

La situacio tre rapide plimalboniĝas kaj estas necesa internacia kunlaboro. Ĉi tiun postulon enhavas ankaŭ la fina rezolucio.

En la Ĉina Akademio de Sciencoj en Pekino estis fondita Sciencista kaj Teknikista Esperanto Asocio. Ĝi serĉas kunlaborantojn en la tuta mondo. En ĉiuj sferoj de nia agado montriĝas neceso de kontaktoj kun ne-europaj esperantistoj, precipe en la terminologia laboro. Adreso de la sekretariino de la Asocio: S-ino Wang Yuehun, Sciencista kaj Teknikista Esperanto-Asocio de la Ĉina Akademio de Sciencoj, Fuxingmenwei Samlihe, Beijing, Ĉinio.

D-ro Le Phuong Nam, Nha 4T2, Phong 25c, Khu I, Cairam, Truong Dai Hoc Cantho, Haugiang, Vietnamio sciigas, ke en la universitato bone aktivas Esperanto-grupo kaj havas subtenon flamke de la rektoro de la universitato. Kontaktoj kun fakuloj estas urĝe bezonataj.

Inter la 27a de julio kaj la 2a de aŭgusto 1985 okazos en Budapeŝto la Unua Universala Kongreso de la Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informatiko kaj Sistemiko /TAKIS/. La laborlingvoj estos Esperanto kaj la angla.

Kun plezuro mi informas vin, ke la 25-an de aprilo 1985 en la instituto de lingvoscienco de Akademio de sciencoj de USSR /Moskvo/ okazis defendo de mia disertacio pri la temo "Kontribuo de la rusa lingvo al la formigo kaj evoluo de Esperanto". Scienca gvidanto - prof. d-ro Magomet Isajev. Oficialaj oponentoj = prof. d-ro Viktor Grigorjev kaj docento d-ro Sergej Kuznecov. Recenzanto de la kompetenta institucio -

/Tartua universitato/ - prof. d-ro Aleksandr Duliĉenko. Rezulte de la sukcesa defendo, la disertacia Konsilio, konsistanta el elstaraj lingvistoj, aljuĝis al mi la sciehan gradon "Kandidato de filologiaj sciencoj" /ekvivalento al la eksterlanda "doktoro"/ pri la specialeco "ĝenerala lingvoscienco".

Boris Kolker

- - - - -

Grava, eĉ decida situacio - jen defio por fakuloj

La ĉi-jara IFER /Internacia Foiro Esperanto-Renkontiĝo/ pritraktis kelkajn realajn programojn por plua progreso de Esperanto. La prelegoj estis tre enhavoriĉaj; jen kelkpunkta sumigo:

1. Informado, informistemoj, /duon/automata prilaborado de tekstoj fariĝis baza bezono de la monda ekonomio.
2. La informoj povas fariĝi alireblaj kaj utiligeblaj por ĉiuj nur per fonda de internacia forumo /jam aperadas Internacia Komputado/, per disvastigado de mikrokomputiloj kaj per komputa interplekto de informistemoj.
3. Tiaj sistemoj postulas la lingvon kaj paroleblan kaj bone instrueblan al automata sistemo. Ĝi devas enhavi kombineblajn morfemojn, regulan strukturon kaj devas esti unusenca.
4. Tiajn postulojn plenumas - inter la paroleblaj lingvoj - plej bone Esperanto. Ĝi bezonas nur negrandajn modifojn kaj ampleksajn difintermarojn.

En la Okcident-eŭropa Komunumo oni jam agnoskis la avantaĝon de Esperanto kaj komisiis du firmaojn konstrui informistemon surbaze de t.n. Distribuita Lingvo-Tradukado, /DLT, pli detale vidu la revuon Esperanto N-ro 1/1984, p.5/.

Ĉi tiu sistemo konsistas el centra memoro /datumbanko/, al kiu estas ligitaj tradukmaŝinoj nacilingve-Esperantaj kaj komputiloj. Ĉiu partoprenanto posedas nacilingve-Esperantan traduk-maŝinon, kiu prizorgas la kontakton kun la datumbanko. La informoj estas stokataj en Esperanto kaj ĉiu partoprenanto ricevas /au donas/ informojn en sia lingvo.

La menciitaj necesaj modifoj en Esperanto estis jam faritaj, sed restas tre grava kaj malfacila problemo: ampleksaj difinivortaroj nacilingve-Esperantaj kaj renverse. Por kunordigi la terminologiajn laborojn oni proponas krei centran terminologian datumbankon. Tio, kompreneble, ne estas facile realigebla. Sed estas eble - eĉ decide por Esperanto - kreadi fakajn terminarojn.

Sen troigo kaj sen dramigo de la problemo, ni urĝe petas ĉiujn, kiuj serioze interesigas pri iu faka agado, aligi al tiu laboro. Jam en la Internacia Seminario en Bad Saarow en decembro 1982 estis ellaboritaj bazaj konkludoj por ĉi tiu laboro. Ili estis publikigitaj en Budapeŝta informilo N-ro 1.-3./1983.

Kiel plua paŝo ĉi-direkte, la Scienca-Teknika sekcio de ĈEA intencas okazigi 5-tagan terminologian kurson komence de septembro 1986. Skribaj studmaterialoj estas preparataj. Ĉar la preparoj de la kurso nur komencigas, ni povos informi pri ĝi nur pli poste, en Starto, en Budapeŝta informilo kaj por seriozaj interesigantoj perletere.

PEDAGOGIA SEKCIO

Resumoj de prelegoj el la pedagogia seminario de ĈEA
Lancov 30.VI.1984

1. Marin Bacev: Problemoj de Esperanto-metodiko

La E-metodikon difinas la celo /praktika: paroli la lingvon/, eduka: pacama internaciismo/, la karaktero /general lingvoinstruado/, la formo /instruado al infanoj, gejunuloj, fakuloj, denaskaj esperantistoj ktp./ kaj la konsisto de la kursanaro /ago, gepatra lingvo, klereco/. La gepatra lingvo parte helpas /pozitivaj transferoj/, parte malhelpas /negativaj transferoj/ la lernadon /interferenco de du aŭ pluraj lingvoj/. La metodiko strikte diferencigas lingvon /konoj pri fonetiko, leksiko, gramatiko/ kaj parolon /kapabla uzi la lingvon praktike: kompreni, paroli, legi, skribi/.

La gramatika-traduka metodo, kiu elformiĝis dum instruado de la latino, baziĝas sur lernolibro, el kiu oni legas tekstojn, analizas ilin gramatike, tradukas patralingven. La beza didaktika unuo estas aparta vorto, ĉefa ekzercadformo traduko, la gepatra lingvo ĉiam ĉeestas.

La metodo de François Gouin /1880/ kiel ĝazan didaktikan unuon havas frazon, nome frazon parolatan antaŭ la frazo legita aŭ skribota, ĉar la aŭdo pli gravas ol la vido. Do unue auskulti kaj paroli, nur poste legi kaj skribi.

La rekta metodo de Wilhelm Viëter /1881/ postulas neuzon de la gepatra lingvo, neinstruon de la gramatiko kaj neuzon de la lernolibro. La ĉefa ekzercadformo estas konversacio, vigla, informa, sprita.

La Esperanta rekta metodo de Andreo Cseh /1920/ la gramatikon instruas, sed ĉiu lernanto mem devas eltrovi la regulojn laŭ proponitaj ekzemploj. La Ce-metodo ne uzas lernolibron, postulas ĥoran respondadon de la kursoj, aplikas konversacion pri aktualaĵoj, humuron kaj sercojn. La instruado devas esti nerapida, pomalgranda kun malrapida kaj klara prononco,

kun uzo de koloraj kretoj, la respondoj devas esti kompletaj /ne sufiĉas jes-ne/. Grava manko de Ĉe-metodo estas la neuzo de lernolibro, ĉar ĝen subteno de lernolibro la instruado povas baldaŭ elvaporigi.

La kompleksa aktiva metodo /KA-metodo/ sistemigas kvante kaj kvalite la studotan materialon, modeligas la gramatikon strukture en logika sinsekvo, uzas intensive modernajn teknikajn helpilojn, la ĝematra lingvo servas nur por kontrolo. La baza didaktika unuo estas frazo.

La sugestopedio, uzita de bulgaro Georgi Lozanov por fremdlingva instruado, estas stato de malvigleco kaj malagemo, stato de ripozo kaj mallacigo, stato de trankvila koncentriĝo. Se estas iu streĉo, oni faras ĝin kun plezuro. La sugestopedio eluzas la subkonsciajn fortojn de la cerbo kaj efikas sur la senvola psikan agadon en maldorma stato /kontraste al hipnota stato/. Dum kvin tagoj la kursanoj komune kunlogas, tutaĝa programo enhavas 10 studhorojn kun duhora posttagmeza ripozo, oni ne uzas tabulon kaj ne donas hejman taskon, instruas pluraj instruistoj de diversaj sekso, ago kaj nacieco, uzante multajn sorĉilojn: antenon, tamburon, buŝmerangon, slogamojn, rostitan fison, muzikon, kretanan lupon, papagomon ktp. Dum la kvin tagoj la kursanoj lernas la gramatikon, mil vortradikojn, komprenas eĉ rapidan parolon kaj promencadon de diversaciaj esperantistoj, ili mem scias paroli kaj konatigis kun la esperantismo. Malavantaĝo estas: se oni tuĝ ne daurigas praktikadon de la lingvo, oni post kelkaj tagoj forgesas ĉion.

Ekzistas multaj metodoj, sed neniu estas absoluta. Ekzistas nur pli aŭ malpli generale validaj principoj, rimedoj kaj procedoj. Eĉ facila lingvo kiel Esperanto devas esti multe ekzercata kaj trejnata, por ke la konoj kaj scioj fariĝu lerteco, kapablo, kutimo.

2. PaeDr. Jaroslav Polenský - Instruado de Esperanto

Organizado de instrua procedo estas por komencantoj /malrapida ritmo, bona prononco kaj akcento, fundamentoj de la lingvo, rilato al Esperanto, reala komunikado, aŭskultado, legado, parolado, skribado/ kaj por progresintoj /automatigo de lingvaj lertecoj, komunika funkcio de la lingvo, taŝa legaĵo, korespondado/. Instrua leciono povas esti klariga, ekzercada, ripetata aŭ kombinita /kontrolo de hejma tasko, ripetado de trastudita lernomaterialo, klarigo de nova lernomaterialo, ĝia ekzercado, nova hejma tasko, konkludo de leciono/. Rimedoj por aktiveco de lernantoj devas ilin ĝuste motivi kaj stimuli por konservi kaj sencese renovigadi ilian daŭran atenton /memstara laboro, konkurado kaj ludoj, praktika uzado de Esperanto, merita taksado kaj laŭdado far la instruisto, amasrespondoj, alternado de instrumanieroj, aŭdovidaj helpiloj/. Efikaj didaktikaj ludoj estas ekzemple vortcano /arbo - bopatro - roko - koralo -lo.../, frazceno

/Mi legas libron. La libro estas interesa. Interesa ekskurso plaĉis al mi. Ekskurso .../ kaj teksto verkita el difinitaj vortoj /hundo, arbaro: Mi posedas hundon. Tre ofte mi promenas kun ĝi en arbaro/.

3. PhDr. Erich Spitz: Pri modernigo de la instruo de fremdaj lingvoj, precipe de Esperanto

Ne konfuzu teknikigon /gramofonoj, magnetofonoj, magnetitaj tabuloj, filmoj, diapozitivaj ktp/ kun modernigo:

- a/ bona instruanto, entuziasmigita por sia objekto, majstranta la lingvon, kapabla domi siajn konojn al la lernantoj;
- b/ tabulo kun kreto!
- c/ bona lernolibro, ne informanta pri banalaĵoj, sed pri nuntempa vivo per konversacio, de moderna leksika kaj semantika enhavo de la instrumaterialo /vojagoj, loĝejo, acetoj, urborigardado, kulturo, sporto, arto, amuzoj, ludoj, hobiaĵoj ktp/;
- d/ bona rilato al la gramatiko, kiu ne devas plu esti timigilo /la direktaj metodoj ne uzantaj la gramatikon havas nur fikciajn sukcesojn ĝis certa nevenkebla bariero/: oni devas lerni la libron kiel sistemon kun fiksita strukturo por gajni superrigardon pri la lingvo, fidindan kaj rapidan orientigon en ĝi kaj kapablon eluzi ĉiujn eblajn derivaĵojn el la minimumo de scioj; oni ne timu la modernan gramatikan terminaron /centro, periferio, semantiko, morfemo, fonemo, monemo, sintagmo, frazotemo, tekstemo, noemo, sememo, leksemo, logemo, pragemo, semantemo, derivatemo, gramatemo/;
- e/ konfrontado kun la gepatra lingvo por eviti interferon /diferenca uzo de la refleksivo, de la negacio ktp./.

Fine memoru, ke ĉiuj miraklaj metodoj estas ĉarlataneco /kial oni ne lernu per ili la matematikon, geografion, historion, kemion aŭ biologion?/ - oni ĉiam bezonas laboron kaj tempon por atingi konstantan scion pri lingvoj.

4. Josef Vondroušek: Pri la kvalitoj de instruanto

La instruanto de Esperanto devas ne nur majstri la lingvon, sed ankaŭ la historion, literaturon kaj nuntempan staton de la movado kaj provizi la kursanojn per bonaj argumentoj. Ne estas sage tro akcenti, ke Esperanto estas facila lingvo, ĉar la publiko poste konkludas, ke Esperanto estas ia primitivaĵo kaj esperantistoj malpli inteligentaj personoj, ne kapablaj lerni alian, pli "normalan" lingvon. Pli ĝi ne estas vero. Esperanto estas riĉa lingvo kaj ekregi ĝian ricecon estas tre malfacila kaj peniga laboro. Pruvo estas, ke nur malmultaj atingas pli superajn sciojn, sed ekzistas multegaj, kiuj ne finas eĉ la fundamentan kurson. La relativa facileco montriĝas en tio, ke diligenta lernanto /eĉ autodidakto/ povas penetri profunden en la strukturon de la lingvo, dum ĉe

aliaj lingvoj la scioj restas nur supraĵaj, se oni ne loĝas certan tempon en la fremdlingva medio kaj ne okupiĝas pri la lingvo profesie.

5. Miroslav Malovec: Pri la enhavo de instruado

La plej grava afero, kiun devas esperantisto lerni, estas la lingvo mem. Se iu propagandas Esperanton ne sciante ĝin, tiu fakte propagandas nur esperantismon disvastigante danĝeran opinion, ke la scio de la lingvo mem ne estas grava kaj bezona. Ni nepre bezonas propagandadon, sed propagandu seriozan lernadon kaj studadon de Esperanto, ne la pseŭdan mondosavan patoson. Krom la lingvoj estas necesaj ankaŭ la historio kaj literaturo de Esperanto, kiuj en niaj kursoj jam firme egradikiĝis. Sed tio ankoraŭ ne sufiĉas. Ni bezonas studi ankaŭ la fundamentojn de la ĝenerala lingvistiko, ĉar personoj dezirantaj influŝi la lingvan evoluon de la homaro devas scii /fine de la 20-a jarcento!/ pli multe ol ordinaraĵoj laicoj. Ni ne devas rebati naivajn, nesciencajn mokojn de la publiko per same naivaj kaj nesciencaj kontraŭargumentoj, bazitaj ekzemple sur la ekstera aspekto de lingvoj. Ĉiu esperantisto bezonas konatigi kun la teorio de tradukarto por eviti sensencan argumentadon, ke iu Esperanta traduko estas "pli bona" ol la originalo /tradukisto ne rajtas la verkon plibonigadi/ kaj por kompreni la bezonon de riĉa vortprovizo. Al la fundamentaj scioj apartenas ankaŭ imago pri principoj de la fakliteraturo, pri neceso normigi terminojn. Ekzistas personoj, kiuj deziras beletrigi terminarojn kaj personoj sopirantaj normigi kaj sensinonimigi la beletran esprimadon. Ambaŭ malpravas. Ĉiu vivanta lingvo bezonas kaj beletron kaj fakliteraturon kaj en ambaŭ stiloj regas iom diferencaj principoj, kiuj tamen ne nuligas unu la alian. Por kompreni tion necesas studi la lingvistikon, tradukarton kaj fakesprimadon.

6. Zdeněk Řezáč: Helpo al komencantoj

La finintaj de fundamentaj kursoj povas esti plu instruataj per tradukaj taskoj. Jam tri jarojn ni sendas al la frekventintoj de la skribaj kursoj ĉe ĉi-ro Hradil tiajn taskojn /al la malpli spertaj por traduki ĉeflingven, al la pli spertaj por traduki en Esperanton/. La temojn ni elektas el Fundamenta Krestomatio, Fabeloj de Andersen, el ĵurnaloj ks. Unu tasko estas dufolia /A4/ kaj la lernantoj ricevas kvar taskojn en unu jaro. Por paroligi la gekomencantojn mi proponas se - majmfinajn renkontigojn kun varia programo por 10-20 personoj.

La programo devas esti zorge preparita /kantoj, deklamado, legado el libroj, konversacio dum promeno en la naturo, ĉiam nur en Esperanto/. La renkontigojn povus organizi kapablaj LG laŭvice en la ĉefaj regionoj /ekz. la 20-a kalendara semajmo en Ústí, la 21-a en Liberec, la 22-a en Opava ktp. Mi persone povas disponigi 3 ekipitajn ĉambrojn en mia domo por 10 personoj, se ili kunprenos dormosakojn.

7. Linhart Rýznar: Pri la rekta metodo

La instruanto laŭ la rekta metodo devas perfekte regi la lingvon, havi komvene fortan voĉon kaj iom da aktora talento, ĉar por la instruado oni uzas diversajn objektojn kaj bildojn, se necesas, ankaŭ simplan mimikon. La plej bona helpilo tamen estas bildoj, teneblaj en la mano. La kursanoj vidas la bildflankon, sed dorsflanke troviĝas serio de konversaaciaj demandoj, kiuj helpas plene elĉerpi la temon de la bildo. Ke tiu helpilo troviĝas dorfleanke, tion la kursanoj eĉ ne rimarkas. Grava estas, almenaŭ dum la komenco, la ĥora respondado de ĉiuj kursanoj je prezentitaj demandoj. Pro tio ĉiuj pli aktive partoprenas la lecionon, ol se la instruanto konversacias kun unuopuloj.

Mi ne povas konsenti kun la negativa opinio de s-ano Malovec pri la rekta metodo /Starto 1/84/. Ĉiukaze ĝi estas pli efika ol la metodo nereakta, ĉar ĝi estas pli amuza; la kursanoj parolas pri la objektoj ĉirkaŭ si kaj pri ĉiutaga vivo. Por lerni la fluan parolon oni bezonas longan ekzercadon kaj necesas praktiki la lingvon dum renkontigoj, kursoj, amikaj babiladoj kaj jam pensi en Esperanto. Kaj tiu formo de ekzercado apartenas al la kategorio de rektmetoda instruado, ĉar oni ne plu uzas la nacian lingvon kaj speciale gvidas la lernanton al la pensado en la lernata lingvo. Al tiu ŝtupo de scio necesas gvidi la kursanojn ekde la elementa kurso.

Rimarkigo de M. Malovec: La rektajn metodojn de fremdlingva instruado rifuzas la oficiala ĉeĥoslovaka eduka sistemo. Tion oni emfazis ekz. dum la lingvistika seminario en Prago 1973 kaj dum la konferenco de germanistoj en Bratislava 1978. Se oni deziras, ke niaj movado kaj instruado estu konsiderataj kiel aferoj seriozaj, ne ĉarlatanaj, la asocio kaj ĝia pedagogia sekcio ne povas oficiale la Ĉe-metodon rekomendadi.

Rimarkigo de L. Rýznar: La rekta metodo havas kontraŭulojn kaj defendantojn. Ĉarlatanan metodon uzas ĉarlatanoj, laŭ rekta metodo instruis Julio Baghy. Ĉu li estis ĉarlatano? Tiun metodon oni instruas dum Universalaĵ Kongresoj. Inter instruistoj estas profesoro Ferenc Jáki el Budapeŝto, mia amiko, ankaŭ membro de la ekzamena komisiono. Ĉu li estas ĉarlatano? Ĉu membroj de la Ĉe-metoda instituto en Hago estas ĉarlatanoj? Antaŭ 60 jaroj Andreo Cseh (Ĉe) en tute aliaj kondiĉoj ne uzadis tipan lernolibron, sed "Literaturon" en 8 malgrandaj kajeretoj, kie en formo de rakontoj la ĝelernantoj povis ripeti tion, kion ili lernis dum la leciono. Do, ne estas vero, ke la kreinto de la rekta metodo ne uzis studmaterialon. La rektmetoda instruado dum 60 jaroj ne stagnis, ĝi aspektas alimaniere ol en ĝia komenco. Ĉiuj lernolibroj sen uzo de nacia lingvo estas rektmetodaj. Antaŭ mi kuŝas tri: Privilegia vojo al lingvo Esperanto, Sub la verda standardo - rektmetoda lernolibro por infanoj, kaj Esperanto laŭ la naturmetodo. Kvanton da similaj mi ne havas. Laŭ s-ano Malovec, ĉiuj verkistoj estis ĉarlatanoj nur pro tio, ke certa grupo de lingvistoj kondamnis la rektan instrumentodon.

EL FERVOJISTA MONDO

La ĉevalfervojo en Hungario.

Ĉiu fervojisto scias, kio estas ĉevala fervojo. Sed vere malmultaj scias, ke la ĉevala fervojo ankoraŭ ekzistas kaj regule trafikas. Oni povas spekti ĝin en Hungario apud fervoja haltejo Konya. En la horaro MAV vi povas trovi ĝin sub la numero 108. Oni konstruis ĝin en la jaro 1938. Ĝi havas spuron /traklargon/ 760 mm kaj ĝi estas precipe dum pluvperiodo, kiam la cirkaua pejzago transformigas en marĉan kaj koton terenon, tiu plej fidinda trafikilo. Ĝia trako komencigas tuj apud la fervoja haltejo kaj gvidas al la komunumo 2,5 km malproksima. La ĉevalfervojo trafikas al ĉiu pasagera trajno, sed nur dum labortagoj, sabate ĝi trafikas nur ĝis la 15-a horo. La trafikostojn pagas la komunumo. Sur la menciita linio trafikas nur tri vagonoj. Du vagonoj estas destinitaj por transporti pasagerojn, unu por trinkakvo.

En Japanio pli rapide.

Ekde marto 1985 sur la japana rapidlinio Tohoku oni plialtigis rapidecon de ĝistiamaj 210 al 240 km/h. En la sama tempo oni finis kunligon de tiu ĉi rapidlinio el la tokia apudurba stacio Omiya kun centro de la urbeĝo, kie ĝia terminalo farigos fervojstacio Ueno. Tiele la veturtempo sur rapidlinio Tohoku inter centro de Tokio kaj urbo Morioka mallongigis el ĝistiamaj 4 horoj al nunaj 2 horoj kaj 45 minutoj. Oni altigis ankaŭ nombron de la tagkunligoj, sur la rapidlinio Tohoku trafikas je ses eksprestrajnoj de la klaso Yamabiko pli multe.

El Norvegio.

Totala longo de la trakoj de Norvegiaj Ŝtataj Fervojoj estas 4 242 km; el ili 95 km estas dutrakaj kaj 2 443 km estas elektrigitaj. La plej longa linio - el Kristiansand al Bodø - longas 1 650 km; el tio lastaj 155 km troviĝas jam post la arka cirklo. Nuntempe post dudek jaroj oni denove pripensas eblecon plukonstrui la linion al neglaciiganta marhaveno Narvik, kiu havas fervojan kunligon nur al Svedujo. La elspezoj proksimume 10 miliardojn da norvegaj kronoj, bezonataj por konstrui tiun ĉi fervojan linion, estas tro grandaj por tiu ĉi "malgranda" eŭropa fervojo. La totala transporto de Norvegiaj Ŝtataj Fervojoj en 1983 malkreskis kompare al 1982 je 5 % de pasagera kaj 6% de vara transporto. Ekzemple transporto de la ferferco el Svedio al Narvik, atinganta antaŭ kelkaj jaroj dek unu milionojn da tunoj poĵare malkreskis en 1983 al 4,3 milionoj da tunoj.

Denove Hålsingborg - Helsingör.

La Svedaj Fervojoj /SJ/ renovigas studon pri la fervoja tunela linio inter Hålsingborg kaj Helsingör. Laŭ nova studo konstruo de la linio kostus 1,85 miliardojn da svedaj kronoj. Laŭ plamo de la konstruaj kostoj Svedio pagus 980 milionojn, Danlando 870 milionojn da svedaj kronoj.

Nova tunelo en Italio.

Sur la nova itala fervojlinio nomata Direttissima, kunliganta urbojn Florenco kaj Romo, oni finkonstruis 11 km longan tunelon apud San Donato. Distanco inter Florenco kaj Romo per fervojo tiel mallongigis el 314 al 206 km kaj la veturtempo je 90 ĝis 100 minutoj. Unu triono de la totala fervoja transporto estos koncentrita al tiu ĉi linio, kies trafiklongo estas 5% de la tuta itala fervoja reto.

La kombinita trafiko.

Al veraj paraĵoj en la fervoja trafiko ĈSD apartenas fervoja linio Opocno pod Orlickými horami - Dobruška. Oni povas tie vidi trafiki motorvagonojn M 152.0 en vartrafiko. La trajnoj al Dobruška kaj reen estas en la horaro markitaj kiel MPv trajnoj kun kombinita transporto de pasaĝeroj kaj varoj /krom ses matenaj kaj vesperaj trajnoj, markitaj MOs/. En pasinteco tie ĉi montris sin tre konvenaj motorvagonoj M 131.1, en novembro 1981 oni anstataŭigis ilin per motorvagonoj M 152.0 el lokomotivdeponejo Meziměstí.

Nova lokomotivo S 499.2.

En majo lastjara forlasis lokomotivfabrikon Škoda Plzeň la unua el du prototipoj de la nova unusistema universala elektra lokomotivo de la pelsistemo 24 kV 50 Hz kun fabrikmarko 70 E. La unuajn dudek lokomotivojn por ĈSD oni fabrikos en 1986. La kvaraksaj lokomotivoj kun povo 3 600 kW kaj rapideco 120 km/h estos uzataj kiel por rapidtrajnoj, tiel por pasaĝer-kaj vartrajnoj.

La nova elektra lokomotivo en fervoja trafiko ĈSD estas markita per marko 499.2.

La muzea fervojo en GDR.

La unua normalŝpura muzea fervojo en Germana Demokratia Respubliko komencis sian regulan trafikon la 14-an de majo 1983. La historia trajno konsistanta el kvar duaksaj pasaĝervagonoj, konstruitaj iam por la veraj linioj, trafikis dum sabatoj kaj dimanĉoj somere en 1983 sur linio Erfurt la cefa stacidomo - Erfurt la okcidenta kun vaporlokomotivo - 94 1292. Tiu ĉi muzea lokomotivo fabrikita en 1922 en lokomotivfabriko Henschel /fabriknumero 18885, la origina marko

T 161 "Essen 8662"/, traveturis en pasinteco multajn historiajn liniojn tirante historiajn trajnojn.

Jam en la jaro 1982 tiu ĉi vaporlokomotivo trafikis sur tiu ĉi lino kun historia trajno transportanta vizitantojn de la historia ekspozicio de la lokomotivoj okazinta okaze de 135 jaroj de la fervojo en Erfurt sur trakaro de la fervoja stacio Erfurt la okcidenta. La vaportrakcio dum la ekspozicio farigis la ĉefa provo por komenci regulan trafikon nur jaron pli poste. Pri la bona rezulto de tiu ĉi provtrafiko atestas jenaj indikoj: dum 66 veturoj inter la 5-a kaj 13-a de junio 1982 transportis lokomotivoj 94 1292 kaj 74 1230 sume dek du mil pasagerojn.

J. Tomíšek

FORLASIS NIN . . .

La 9-an de julio adiaŭis lastfoje multnombraj geomikoj kaj parencoj kun Naďa Z e d n í ě k o v á el Lanškroun. Ŝi estis unu el fondintoj de EK Lanškroun, delegito de UEA, aktiva sekretariino de la klubo. Eklezian enterigon ĉeestis gesamideanoj el najbaraj kluboj: Česká Třebová, Zamberk, Svítavy, Litomyšl, Pardubice k.a. Ni kondolencas la familion kaj geomikaron. La Esperantista movado perdis en si ofereman samideaninon. zP

Lunde, la 5-an de aŭgusto 1985 lastadiaŭis geomikoj kaj parenkaro samideanon František M l y n á ř , mortinta en ago de 70 jaroj. Ekslernejestro F.Mlynář ricevis diversajn plurajn superajn ordenojn pro publika kaj pedagogia laboroj. Li estis ankaŭ aŭtoro de pluraj natursciencaj artikoloj kaj terminologioj. Bedaurinde granda oklingva botanika vortaro ne estis gisfinita. EK en Lanškroun ĉi-jare perdis jam duan membron. ing.P.

La 24-an de julio en Prago mortis s-ano Anežka Š u s t r o v á , en ago de 85 jaroj. Ŝi estis bona esperantistino, fidela edzino de longjara prezidanto de la Praga Klubo s-ano Jaroslav Sustr. Al la familio ni esprimas nian kondolencan.

En ago de 72 jaroj mortis subite en Prago s-ano K u k a ĉ k a la 24-an de julio. Li estis laborema kaj oferema esperantisto, ĉefpropagandigito de la Praga Klubo, kiu tre zorgeme okupigis pri la arangado de la klubaj montrofestoj. Lia forpaso farigis granda perdo por la Praga Klubo. Al la familio ni esprimas nian kondolencan.

LINGVA ANGULO

La problemo de enigmaj mallongigoj

Bernard Golden

Tre malagrabla travivaĵo estas legi verkom en Esperanto sen kompreni ĉion. Unu el la kialoj povas esti abundo da neologismoj. La provo de kelkaj aŭtoroj sencese enkonduki novajn elementojn en la lingvon ĉiam fiaskas, ĉar ne estas facile konvinki aliajn uzantojn de Esperanto, ke ĉiuj tiuj neologismoj estas bezonataj. Aliaj verkistoj emas lardi siajn tekstojn per fremdaj vortoj kaj esprimoj, ĉerpitaj ĉefe el la latina kaj angla lingvoj, por paradi antaŭ legantoj per sia profunda erudicio. La efiko tamen estas kontraŭa, ĉar skeptika leganto demandas sin, kial je la barbo de Beaufront, tiuj aŭtoroj ne povas trovi ekvivalentojn de la fremdaj esprimoj en Esperanto.

Tria fonto de obskureco en Esperantaj verkoj estas la daŭre plioftiganta kutimo mallongigi vortojn kaj proprajn nomojn, kvazau ne estas tempo aŭ spaco uzi la plenajn formojn. Tiu svarmado de sigloj ne karakterizas nur publikigaĵojn en Esperanto, sed estas fenomeno troviganta ankaŭ en kelkaj etnolingvoj. Por montri, kiel enigmaj povas esti tekstoj pipritaj per neklarigitaj mallongigoj, mi faris provon klasifiki la siglojn uzatajn en unu numero de periodaĵo.

Grupo A:

En tiu ĉi grupon mi metas tiujn mallongigojn, kiuj jam de longe enradikigis en Esperanto. Ili ne bezonas apartan klarigon, ĉar pluraj vortaroj registras ilin. La plej kompleta listo de mallongigoj trovigas en Plena Ilustrita Vortaro /PIV/ sur paĝoj xxxv kaj 1216 - 1219.

E-klubo	E-rondetoj	s-ano	ĵc.
E-Asocio	E-lernolibroj	s-anino	k.a.
lernado de E	E-movado	d-ro	LKK
someraj E-lernejoj	E-bazaro	ing	
E ekzameno		esp-istoj	

La litero "E", sola aŭ ligita kun alia vorto per ligostreko, plej ofte signifas "Esperanto", sed en "E-junularo" kaj "legantoj de ES" ĝi estas mallongigo de "esperantist-". Kelkfoje "E-K" estas uzata. Ĉar "K" povas signifi ankaŭ "komitato", "komisiono" kaj "kongreso", ne estas konsilinde uzi ĝin anstataŭ "klubo". Ekzemple, ĉu la "Subtatra E-K" temas pri klubo aŭ komitato?

Grupo B: Ekzistas mallongigoj uzataj en kelkaj publikigaĵoj aŭ landoj, sed ne universale en Esperantujo, do estas necese diveni la signifon laŭ la kunteksto. La "j" de "en la j.1370" sendube signifas "jaro", kaj "dez kor k cl" estas decifrebla kiel "deziras korespondi kun ĉiuj landoj". Rimarku, tamen, ke "k" kaj "ĉ" ĝenerale signifas "kaj" kaj "ĉirkau" respektive. Inkludebla en tiu ĉi grupo estas ankaŭ sigloj de no-

Grupo C:

Tiu ĉi grupo enhavas siglojn, kies uzo estas limigita al unu lando aŭ regiono; cetere, ili ne estas kompreneblaj, eĉ en kunteksto. Estas necese do, klarigi ilin aŭ en artikolo mem aŭ en aparta glosaro. Tiel estas traktitaj la sekvaj kvar mallongigoj.

- ReK - Regiona Komitato
- KET - Kulturaĵ Esperantistaj Tagoj
- VEF - Vintra Esperantista Feriado /enŝteliĝis erareto, ĉar la gusta titolo estas "Vintra Esperantista Ferio"/.
- IREBIK - Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj ĉe Berlino /GDR/ en la Interkampadejo Krossinsee /tiu ĉi siglo, kiu estas facile prononcebla, estas bona, ĉar per ĝi la pli ol 70 literoj en la plena titolo reduktiĝas al 6!/.
- IFAC - Internacia Automatiga Asocio /kvankam la siglo estas klarigita per Esperanta titolo, ĝi ne akordas kun la literoj IFAC, kiu estas mallongigo de vortoj en alia lingvo; rezulte de tio, ne estas eble scii la veran nomon de la organizaĵo/.

Manke de klarigoj ne estas eble, eĉ en kunteksto, esti certa pri la signifo de la sekvaj sigloj, ankoraŭ ne registritaj en PIV: AESSR, ĈEA, JES /rimarku, ke en Svislando "JES" signifas "Junularo Esperantista Svislanda"/. La plej enigmaj mallongigoj rilatas al lokaj aŭ regionaj aranĝaĵoj: VERAT, PERAT, TUSE, OrSREK. Ili estas kvazaŭ volapukajoj, makulantaj la purecon de Esperantaj tekstoj.

Grupo D:

Malkonsekvenco karakterizas la uzon de du sistemoj de mallongigoj, la Esperanta kaj la internacia, por indiki landnomojn. Apud Esperantaj sigloj kiel GDR /Germana Demokratia Respubliko/, ĈSSR /Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko/ kaj USSR /Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj/ troviĝas la internaciaj postaj kaj automobilaj sigloj CS, SU kaj H. Elektenda estas unu aŭ la alia sistemo; oni neniam miksu ambau en unu sama verko.

Ankoraŭ unu problemo koncernas profesiajn titolojn kiel "d-ro A.Lukač, CSc". Malgraŭ sia latina deveno tiaj sigloj de titoloj ne estas internacie kompreneblaj, ĉar la uzado diferencas laŭlande. Ĉu oni do, provu esperantigi ilin?

Konklude, mi volas emfazi, ke la uzo de enigmaj mallongigoj malhelpas interkomunikadon, kiu estas la celo de lingvo, precipe internacia lingvo. Pro tio, redakcioj devas insisti, ke aŭtoroj klarigu la siglojn, kiujn ili uzas.

RECENZOJ

Zsigmond Móricz: Varmega kamparo

Romano. El la hungara tradukis István Nagy. Lingve reviziis William Auld. Eldonis Hungara Esperanto Asocio Budapest 1985, pagoj 169, formato 20/14 cm, kartonita, prezo 75 forintoj. La aŭtoro, hungara klasikulo, venkintaj en diversaj genroj, prezentas al ni ĉi tie realisme kritikan bildon de hungara kamparo, de degeneranta etnobela societo el la j.1929. Post iom malvigla komenco riveligas antaŭ ni streĉa kriminalromano. Sed sub tiu ĉi masko ludigas amrilataj okazaĵoj, kritikaj observoj de sociaj misaĵoj. Intrigoj tenas la leganton streĉita ĝis la fino. La verkom vivigas multaj dialogoj kaj eble nur fremdeco de la medio ŝajnigas al la leganto iun scenon ne tute konvinkiva. La libro donas etan enrigardon en la ampleksan verkom de Móricz, kiun ni, merite de aprezinda eldonagado de HEA, povas ekkoni. La libro havas bonan lingvan nivelon sen multaj preseraroj. Jen kelkaj lingvaj korektindaĵoj, kiuj tmaĝitis: 68/6 fumon li eligis tra lia nazo /sia/; 90/18 sin trafas malfacila momento de sia vivo /sia/; 101/1 krome la plej terure... /sen "la"/, 103/15 oni ne balaas /sen "ne"/, 103/19 por mortpafita homo /pro/; 110/12 sulkoj widigas sur sia frunto /sia/; 148/24 lia rigardo memorigis sin pri sia edzo /sia/. La libron mi povas rekomendi kiel absorbanta legaĵon.

J.Kořínek

Károly Aszlányi: Sep vangofrapoj

Romano. Tradukis el la hungara László Somlai /Spienez/. Dua eldono. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1984, formato 20/14 cm, pagoj 148, kartonita, prezo 60 forintoj. En bela agrable legebla preso reeldonigas la sprita humurplena romano de Aszlányi. Kun plezuro oni guas la ĝudacajn petolegaĵojn de senlabora angla ingeniero, kiu venas ĝian "piedbatitan animon" far senskrupula monmagnata ŝtalrego. La aŭtoro ofte skermas per angleca fajna humuro kaj la leganto gustumas apud groteskaĵoj pensojn filozofiajn, amromaneton kaj nepre bone amuzigas. La lingvaĵo estas tre bona, kvankam videblas, ke la traduko devenas el antaŭ 1943, kiam ĝi unuafoje aperis ĉe The Esperanto Publishing Co. Pregeraroj estas 3-4, mencioblaj korektindaĵoj /100/-3 ovo kuŝanta en, sia mano /lia/; 102/17,21 al kutimigitaj /alkutimigintaj au al kutimigitaj/. Jen ree bela libro de HEA, al ĉiu rekomendeb-la.

J.Kořínek

Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko II, eldonis Slovaka E-Asocio, Poprad 1984.

Post apero de unua kolekto de prelegoj havas ni en la mano la duan, prezentantan ses novajn kontribuojn. Jam la enkondukaj vortoj de prezidanto de SEA precizigas la orientigon de la

temaro. Al unuopaj kontribuoj:

E. Spitz: Genro kaj sekso en la etnaj lingvoj kaj
Esperanto.

Unue difiniĝas "mocio" kaj montriĝas diversaj rimedoj por diferencigi genrojn el gramatika vidpunkto, uzante fikti-
vajn unuojn de morfologia klasifikado. Pli detale estas studa-
taĵaĵo adicio kaj substituto kiel la plej oftaj rimedoj por es-
primi genran opozicion. Kiel ekzemploj servas plej ofte ĉe-
haj kaj germanaj vortoj. Ĝiaj eblecoj estas heteronimio, al-
domo de speciala vorto, au la genro /sekso/ ne menciigas. "Mo-
cio" en Esperanto estas studata kun konstato, ke en Esperanto
ne ekzistas ia fakte regula, senescepta maniero por esprimi
deziratan opozicion. Meritas rimarki, ke neniu planita kaj
samtempe vivanta kaj evoluiganta lingvo havas pure logikan
konstruon, car la vortmaterialo devenas de etnaj lingvoj, sed
ekzemple kurioze la logika opozicio patro / patrino ne havas
paralelon en etnaj lingvoj. Indus ankaŭ kompara pristudo de la
problemo, kiu montrus diverstipaj lingvojn tuj apude de Espe-
ranto, simile kiel la fina tabelo. Krom la opozicio maskla/fe-
mala estus interese pritrakti la neutron, ĉu ekzemple tiu ka-
tegorio en Esperanto indikas nur gramatikan genron, ne sekson.
Fine la leganto certę bonvenigus liston de la literaturo, kie
li povus plu informigi pri la studata afero.

Jiří Zeman: Rimarkoj al la fonologia sistemo de Esperanto

La aŭtoro celas priskribi fonologian sistemon de Espe-
ranto; li eliras el la vidpunkto de ĉeĥa parolanto kaj tra
tiu ĉi prismo priskribas la sistemon de Esperanto. Rigardante
al pure akustika vidpunkto kaj neforgesanto relevantecon de
fonemoj li tabeligas konsonantan kaj vokalan sistemon. Li e-
vitas priskribon el vidpunkto de loko kaj maniero de artiku-
lacio, kiu ebligis priskribon sendepende de fonologia sistemo
de alia lingvo. Tial rezultas kelkaj interesajoj, kiuj dife-
rencigas Esperanton de la ĉeĥa. Sekvas kvantaj studoj de fo-
nologia sistemo de Esperanto. Prave rimarkiĝas, ke Esperanto
eĥavas fonemojn komunajn al plimulto de kulturaj lingvoj.
Aŭtoro apogas sin al konataj fonologiaj studoj kaj teorioj
de Skalicka kaj Hála.

Vladimír Gregor: Signoj de la vivanteco de Esperanto.

Prave konstatigias enkonduke, ke kelkaj trajtoj de Espe-
ranto estas identaj, sed kelkaj diferencaj de naciaj lingvoj.
Oni mencias historie diversajn lingvistikajn skolojn /ekz. bio-
logie lingvistika, novgramatika, strukturalisma/ kaj ankaŭ ca-
pitroj el la evoluo de planlingvistika movado inkluzive de la
esperantista. Sekvas studo pri fonologiaj kaj morfologiaj san-
goj, kauzataj de diversnacieco de parolantoj. Poste oni limi-
zas sin al pristudo de literatura kaj poezia lingvo kaj emfaze
konkludas per citaĵo de Cart. Unuflanke dirite, pravigas la

fakto, ke poezio kaj literaturo kiel superkonstrua fenomeno speguligas la vivantecon de lingvo kaj pruvas ĝian komunikativan kaj kulturan valoron. La skriba materialo ankaŭ plej bone ebligas studi diversajn ŝanĝojn en la lingva stilo. Sed tio ne estas ununuraj signoj de la lingva vivanteco. Kvankam la aserto: "Esperanto estas internacia komunikilo de niaj ideoj" ne malpravas, oni ne miksu lingvistikan kaj sociologian aspekton de la lingvo. Se ĝi ekzistas kaj evoluigas same kiel iu ajn lingva sistemo, kial ni estu "Zamenhofe modestaj"? Ĉu Esperanto rajtas esti mezurata kaj aprezata same kiel iu ajn vivanta lingvo.

Aleš Bednařík: Bazaj principoj de Esperanto-terminologio.

Klara kaj aktuala prelego pri unu el gravaj problemoj de samtempa lingvouzo. Fakaj terminoj estas nepre bezonataj kaj ilia komprenebleco kaj internacieco ofte kolizias kun pure lingvistikaj postuloj, koncernantaj sistemecon kaj derivadon. La aŭtoro supervide prezentas al ni la bazajn postulojn pri kvalitoj de Esperanta terminaro. Ankaŭ en tiu ĉi sfero necesas krei kompromise aĝan solvon.

Eduard Gašinec: Struktura tipologio de Esperanto

Analizo de la lingvo el fonologia, morfologia kaj leksika vidpunkto, laŭ la kategorioj de ĝenerala lingvistiko. Por ilustrati kelkajn fonologiajn opoziciojn estas uzataj ekzemploj el naciaj lingvoj - do denove neevitebla momento de komparo de Esperanto kun etnaj lingvoj. Fine konkludiĝas, ke nek Esperanto estas tipologie unueca lingvo. Tiun ĉi faktan agnoskas ĉiuj modernaj tipologiaj studoj, inkluzive la plej diskutataj teorioj de Piron, Bausani, Gacond kaj Pennacchietti. La lingvan analizon kompreneble limigas konscie planitaj eroj de lingvosistemo de Esperanto. Aliflanke, ĝuste la fiksigo, normigo kaj priskribo de la lingva tipo helpas al celita kaj programita konstruo de lingvo de estonteco.

Stanislav Košecký: La loko de Esperanto en la kategorio "homa lingvo".

Post orientiga enkonduko karakteriziĝas la termino "homa lingvo", kiu pli malpli korespondas al karakteristiko de natura aŭ etna lingvo. Tiuj ĉi problemoj estas large pritaksataj ekz. de Blanke. Kiel opozicio figuras artefarita /planita/ lingvo. Aŭtoro klarigas unue teorion de lingva signo, kiu havas artefaritajn ecojn, do la signoj de Esperanto kiel lingvo ankaŭ koncernas la aferon. Same kiel Blanke konstatas Košecký, ke la nomo "artefarita" ne taŭgas por Esperanto. La dua parto de prelego pritraktas universalecon, malregulecon kaj evolu-kapablecon de la lingvo. Rezultas, ke Esperanto plenumas ĉiujn kriteriojn de "homa lingvo", ĝenerale lokigas ĝin interlingvis-

toj apud la lingvoj naciaj /etnaj/.

Same kiel la unua kolekto, ankaŭ tiu ĉi libreto kontribuas al evoluo de nia interlingvistiko, kiu montras fakan nivelon de ĉeĥoslovakaj esperantistoj.

V. Barandovská

POR DISKUTO

ĈU BOHEMIO, ĈU ĈEĤIO ?

Josef Chvosta

Kiel en multaj eŭropaj lingvoj, do ankaŭ en Esperanto estas du terminoj /Bohemio - Ĉeĥio/, kiuj signas la landon, lingvon au nacion, kiuj vivas proksimume en la centro de Eŭropo. Sed rekte en la ĉeĥa lingvo, slavaj lingvoj kaj aliaj lingvoj tiuj du terminoj ne ekzistas. Kiu termino estas pli gusta? Certe tiu lau la ĉeĥa lingvo, sed kial propre aperis tiu alia termino? Tiu nepre estas pli malnova, sed nepreciza, ĉar ĝi en la latina lingvo signifas tion, kio koncernas la keltan tribon de boĵoj, kiuj tiam, do eble ĉirkau komenco de nia jarindiko, tie vivis. Sed tiuj kelkaj boĵoj malaperis, venis germanaj markomanoj kaj en la kvina jarcento de nia erao slavaj triboj, kiuj tie restis kaj konstituigis al "barbaraj ŝtatoj", kiujn oni konas nur neprecize pro tiu "barbareco", nome nekapablo postlasi skribitajn kaj pli fidindajn dokumentojn. Oni nur malmulte scias pri la imperio de Samo, pri Grandmoravia imperio kaj nur la tria fazo, la bohema ŝtato, kiu aperis eble en la deka jarcento, sub la dinastio de Přemyslidoj, sed Přemysl mem, fondinto de tiu dinastio, estas mita persono.

Tiu bohema ŝtato estis rezulto de unuigo de multaj aliaj slavaj triboj, el kiuj ĉefaj estis ĉeĥoj, lau kiuj la ŝtato alfine estis nomita. Sed tiam regis la latina lingvo, do oni komencis uzi la terminon "bohema". Kiel ĉiu feudula ŝtato, la bohema ŝtato konsistis el feudaj provincoj, el kiuj poste restis Bohemio, kies estro estis pli supera ol tiuj de Moravio, Silezio, Luzacio, iam Krakovio, Brandenburgio, Karintio kaj aliaj, kiuj de tempo al tempo kunigis sub la ŝopetro de bohema estro, kiu en la dektria jarcento farigis reĝo, estis unu el sep kurfirstoj de la "Sankta romia imperio" kaj foje eĉ imperiestro de tiu imperio.

Bohemio estis natura centro de tiu ŝtato, precipe pro siaj montoj, kiuj disigas ĝin de la ceteraj feudulaj landoj. Kompreneble en feudula ŝtato, kie hegemoniis nobeloj kaj pastroj, la ĉefa lingvo estis la latina lingvo, sed kiam aperis strebadoj de la urba ŝtato pri partopreno al regado, montriĝis, ke en la bohema ŝtato estas kaj ĉeĥe kaj germane paro-

lantaj ŝtatoj. Sed oni ankoraŭ ne konceptis tiel la nacian problemon, do en la universitato, fondita en 1348 en Praha, estis statuto por kvar "nacioj": bohema, bavara, saksa kaj silezia. Sed nur la studentoj en la "bohema nacio" parolis ĉeĥe, ĉe ne ĉiuj, dum la plimulto, el "aliaj nacioj" parolis germane, ĉe se ne ekzistis ankoraŭ oficiala momo de tiu lingvo. En la ĉeĥa lingvo oni nomas homojn germane parolantajn "mutuloj" /Němci/ kaj tiu termino restis ĝis nun en kelkaj slavaj lingvoj. Sed la interna universitato estis ankoraŭ longe sub la hegemonio de la latina lingvo. Kaj tial nur en 1409 la alia ĉeĥa reĝo destiniĝis al "bohemoj" en la universitato tri voĉojn, dum ĉe ceteraj "nacioj" nur unu voĉon. Tiu dekreto gvidis al la fondo de universitato en Leipzig kaj estis stimulita de reformatoro Johano Hus. Tie aperas strebadoj pri oficialigo de la ĉeĥa lingvo, kiun parolis la plimulto da ŝtatanoj de la "bohema ŝtato".

Venis epokoj de progreso kaj dekadenco en lukto kun la hegemonio de la latina lingvo kaj en kunlaboro de nobeloj kaj urbanoj. En la dekkvina jarcento la ĉeĥa lingvo grave ŝkloris, precipe sub la ĉeĥa nobela reĝo Georgo de Poděbrady, sed precipe post 1620 venis grava dekadenco. Tiam sur la ĉeĥa tronon aperis la habsburga dinastio, kiu unuigis la mezan Eŭropon kontraŭ turka ĝinaco. Sed ĉeĥaj nobeloj kaj urbanoj ribelis en 1620 kontraŭ tiu dinastio kaj estis kruele punitaj. Anstataŭ elpelitaj ĉeĥaj nobeloj kaj urbanoj venis fremduloj, kiuj parolis la germanan lingvon, ĉar tio estis la lingvo de la habsburga dinastio. La habsburgaj estroj restis ĉe, kiam la minaco de turkoj estis venkita, kaj strebis formi mezeŭropan unuecan imperion. Precipe Jozefo II-a en 1780 ĝis 1790, kiu nuligis servutecon, komencis kun germanizo de la imperio. Li rifuzis ĉe la kromon de la bohema ŝtato, kiu alfine konsistis nur el Bohemio, Moravio kaj Silezio, li estis tial de ĉeĥe parolantaj bohemoj malsimpatie akceptata, ĉe se la muligo de servuteco estis ago simpata.

En la fina epoko de la dekkvina jarcento do estis komencita lukto por renovigi la pozicion de la ĉeĥa lingvo, kiun parolis ĉe post 1620 nur primitivaj klasoj. Kelkaj tiamaj patriotoj ĉe dubis, ke la lingvo estos savita, ili verkis nur latine kaj germane, ĉe se ili skribis pri la ĉeĥa lingvo. En la habsburga monarkio estis ĉe aliaj lingvoj.

En 1867 aperis aŭstrohungara monarkio, do hungaroj eldevigis aprobon de sia lingvo, sed la ĉeĥa lingvo luktitis por la aprobo ĝis la fino de aŭstrohungara monarkio. La habsburga dinastio estis germana, en la bohema ŝtato estis kontraŭ ok milionoj da ĉeĥoj eble 4 milionoj da germanoj, la nombroj me estis precizaj, ĉar la preferado de la germana lingvo devigis precipe komercistojn paroli germane. Ankoraŭ en 1848 estis "bohemiaj delegitoj" invitatitaj al la parlamento en Frankfurt, en la kongreso de Bohemio kaj Moravio estis ne nur ĉeĥaj, sed ankaŭ germanaj deputatoj. Tamen oni jam komencis opinii per "bohema lingvo" la ĉeĥan lingvon, dum en la dekkvina jarcento tio estis ankoraŭ dubinda.

Sed ĝenerale la aŭstro-hungara monarkio estis malamika al aliaj naciecoj krom germana kaj hungara kaj tial dum la unua mondmilito la gravaj estroj de la ĉeĥa nacio vokis ĉeĥojn, kiuj servis en la monarkia armeo, al aligo al "ĉeĥoslovaka armeo", kiu aperis en Rusio, Francio kaj Italio. El vidpunkto de la monarkio tiu estis "patrujperfidig". Krome slovakoj estis ankaŭ slavoj, ĝis 1844 ili uzis la ĉeĥan lingvon, en sia modesta literaturo, sed tiu lingvo estis poste anstataŭita per la memstara slovakaj lingvo. Tiun hungaroj post 1867 persekutis same kiel en la aŭstra parto estis persekutata la ĉeĥa lingvo, ja eĉ pli, ĉar ili eĉ ne konis la terminon "slovakoj" nur slovakaj parolanta hungaroj. Kaj la simileco de lingvoj gvidis al ideo pri unueca "ĉeĥoslovaka nacio" kum du lingvoj.

Tiu ideo estis validigita en la ĉeĥoslovaka ŝtato, kiu ekestis post 1918. Ĝi konsistis el "historiaj provincoj" Bohemio, Moravio, Silezio, al tiu venis Slovakio, kiu ja neniam estis memstara, tial la limon inter Hungario kaj Slovakio oni nur poste fiksas. Kaj alfine al tiu ŝtato estis aligita Subkarpata Rusio, kie vivis ukrainoj. Kaj tial Ĉeĥoslovakio de jaroj 1918 - 1938 estis multnacieca ŝtato, kie estig eble 9 milionoj da ĉeĥoj, 3 milionoj da slovakoj, sed ankaŭ 3 milionoj da germanoj kaj krome aliaj naciecoj; hungara, pola, ukraina. Sed germanoj ne volis esti en tiu ŝtato, ili aligis eĉ al resto de Aŭstrio, eĉ se tio ne estis teritorie ebla. Tamen la ŝtato konsolidigis, sed aperis novaj konfliktoj, precipe ekonomiaj. Ĉio ĉi gvidis al jaro 1938, kiam "bohemiaj germanoj" postulis aligon al la nazia imperio. Kaj kiam venis nazistoj, do ili montris, kiel ili imagas la solvon de kunvivado de ĉeĥoj kaj germanoj. Tial la mura sekvo estis ellandigo de germanoj el "Bohemio".

Do "Bohemio" bohema estas historia realeco, nun ne plu ekzistanta. Tial oni preferas "ĉeĥa ĉeĥio", Bohemio ne ekzistas plu eĉ kiel teritorio, ĉar nun estas distriktoj kaj regionoj. Provinco ne ekzistas kaj depost 1968 ekzistas en federacia unuigo: Ĉeĥa socialisma respubliko, Slovaka socialisma respubliko. Kaj la tuto estas Ĉeĥoslovaka socialisma respubliko, au mallonge Ĉeĥoslovakio. La eksaj provincoj malaperis: Bohemio, Moravio, Silezio, Slovakio, Subkarpata Rusio. Tiu lasta aligis al soveta Ukrainio. Eĉ la respubliko en 1938 ne konis Silezion, estis nur Moravosilezia provinco. Dum la 20 jaroj de la unua respubliko oni eĉ intencis enkonduki departamentojn, sed tio ne okazis.

Kiam nazioj okupaciis la reston de la respubliko, ĉar Slovakio estis sub ili memstara "Slovaka ŝtato", do ili akcentigis: Protektorato Bohemio kaj Moravio, Protektorat Böhmen und Mähren, sed nur pro ekstero. Interne ili parolis pri malnovaj imperiaj provincoj "alte Reichsländer". Kiam en 1945 estis la respubliko liberigita, do komence restis la provinca divido, sed en 1949 aperis regionoj nomitaj lau ĉefaj urboj. Per tiuj regionoj estis nuligitaj provincoj Bohemio kaj Moravosilezio, ie la limo estis eĉ interne de distrikto au regiono.

En 1960 estis reorganizo de regionoj, anstataŭ 19 estis nur 10, tie reaperis la historiaj nomoj: centroĉeĥa, sudĉeĥa, okcidentĉeĥa, nordĉeĥa, orientĉeĥa, sudmorava, nordmorava. El la tuto montriĝas, ke termino sudbohema, okcidentbohema ktp. estus same prava, sed la unua termino estas politike preferinda. Kaj alfine estas necese skribi, ke la limoj de Bohemio, Moravio kaj Silezio ne estis ĉiam tute samaj; aperis eĉ strebado formi apartan moravan lingvon, sed ĝi restas nur dialekto. Netuŝita restis la limo inter ĉeĥe parolantaj teritorioj kaj slovake parolanta teritorio, eĉ se la respubliko de 1918 - 1938 parolis pri unu nacio "ĉeĥoslovaka" kun du literaturaj lingvoj.

Sed se ĉeĥaj instruistoj estis senditaj en Slovakion, ili tie komencis paroli ian piksitajn lingvon, kio gvidis al la malamo de slovakoj kontraŭ ĉeĥoj. Tial okazis, ke en 1938 la slovakaj faŝistoj kunigis kun naziaj germamoj kontraŭ Ĉeĥoslovakio.

Rezulte: ĉar tiu problemo koncernas nur Esperanton /kaj ali-gajn europajn lingvojn/, do la respondo estas, ke oni preferu: ĉeĥa, ĉeĥio. En la ĉeĥa lingvo estas tiu problemo en alia nivelo: ĉeĥio estas ne nur Bohemio, sed ankaŭ Moravio kaj resto de Silezio. Tial internacie: Ĉeĥoslovakio estas ĉeĥio kaj Slovakio. Sed en la ĉeĥa lingvo tiu ĉeĥio signifas nur Bohemio, ne Moravio kaj Silezio. Kaj tial oni serĉas la ĉeĥan terminon, por ne paroli en perifraroj: Cechy, Morava, Slezsko, Československo, Česko, české země, Česká socialistická republika.

- - -

BLAHOPŘEJEME

PRAVDA, orgán KV KSČ Západočeského kraje, Plzeň /15.8.1985/:
"Medaili prezidenta republiky "Za obětavou práci pro socialismus" obdržela u příležitosti 70. narozenin hospodářka uliční organizace KSČ č. 18/3 a funkcionářka Ceskeho esperantského svazu Marie Turková, vedoucí klubu důchodců. Vyznamenání jubilarce předal vedoucí tajemník MěstV KSČ v Plzni s. Vladimír Pátek".

Ni sincere gratulas al s-animo M.Turková, vicprezidantino de la Centra Kontrolo kaj Revizia Komisiono de ĈEA, pro honorigo de sia longjara partia kaj publika laboro per medalo de la prezidento de respubliko "Por la oferema laboro por socialismo" okaze de sia 70-a naskiĝtago.

INTERLINGVISTIKO

ESPERANTO KAJ ALIAJ PROPONOJ DE INTERNACIA LINGVO

Josef Chvosta

Esperanto festos baldaŭ cent jarojn de sia ĝkzigtado. Ĉe se ĝi sukcesis rapide anstataŭigi volapukon, ĉar ĝi estis pli praktika kaj pli uzebla, tamen kelkaj anoj de Esperanto, malkontentaj pro malrapida disvastigo de la internacia lingvo, proponis tiajn sangojn, ke ili elpensis novajn projektojn de la internacia lingvo. Sed malgraŭ sia fanfaronado ĉiuj novaj projektoj nur malfaciligis la gramatikon. Ĉe se ili propagande skribis: Gramatiko sur unu pago - tamen pro strebi pri pli granda internacieco, ili ellasis gravajn esceptojn kaj la simpleco de la gramatiko estis perdata.

Komprenante la gramatikojn de Ido, Okcidental kaj Interlingua, oni povas konstati, ke la gramatiko pli kaj pli malsimpligas kaj malproksimigas de la facileco de Esperanta gramatiko, precipe en vortfarado. Pro internacieco, kiu estas dubinda, oni ellasas diferencon prononcadon de C G T lau la latina lingvo, ĉe se magnetofonajn bendojn kun prononcado de la latina lingvo el diversaj tempoj de ties uzado, neniu havas, tial oni ne povas aserti, ke la prononcado lau la mezepoka latina lingvo estis ĉiama. Sed la aliaj projektoj pravigas la latinan lingvon tre detale, ĉe se la novaj internaciaj vortoj ne devenas nur el la latina, sed ankaŭ el la greka lingvo, kiu ja restas en ombro, ĉar ĝi ne uzas la latinajn literojn.

Kaj tiel move trovitajn vortojn: demokratio, aristokratio, kiu ĝ estas nek latinaj, nek grekaj, oni altrudas legi: demokratio, ĉar oni tion legas tiel en nunaj romanidaj lingvoj kaj ankaŭ en la angla lingvo. Sed ĉu vere? Fakte en romanidaj lingvoj, oni aŭdas ion, kiel "demokrasjon", en angla lingvo ĉe "dimokrejsn". Tial oni elpensas por siaj projektoj ian prononcadon de hispana deveno, sed kompreneble la gramatiko estas influita de la angla lingvo, kiu estas relative plej facila. La facila prononcado malaperas, venas gravaj reguloj pri la akcento, oni ne malhelpas, ke aperu diferenca prononcado de kelkaj zeugmoj. Ankoraŭ malpli facila estas la vortfarado. Oni strebas pri unu sencoco de sufiksoj, sed tio estas tre malfacila. Tial oni allasas esceptojn, kontraŭ Esperanta "patro, patrino" estas en Interlingua: "patre, matre", ĉar tio estas internacia. Sed ĉu fakte: en hungara lingvo: atya, anya, en kartvela lingvo ĉe: mama, deda. Kaj tiel la sufiksoj kaj prefiksoj nepre ne povas esti sur unu pago.

Tamen tiuj projektoj ekzistas kaj estas disvastigataj kaj propagandataj, ĉar homoj jam estas tiaj kaj ne kapablas teni unuecon kaj konsenti kun tia progreso, kia aperis en Esperanto. Certe estas novaj sufiksoj: sabloza, purgatorio, laboratorio, verdeska, novaj vortoj: skolo, trista, olda, eluzado de kunmetitaj verbaj formoj.

Estas proponata ankoraŭ tiu ebleco: eluzi la aliajn projektojn en tradukado de beletrio por montri dialektojn. Jen estas propono eluzi la lastan projekton "Interlingua" por esprimi dialektojn. Sajnas, ke al tiu lasta projekto transiris la iamaj Idistoj kaj Okcidentalistoj. Samtempe estas propono sumigi la gravan gramatikon de Interlingua sur malgranda spaco.

Interlingua uzas la originan latinan alfabeton, kiu havas 26 literojn. En Esperanta aboco estas 28 literoj, sed ekzistas ses supersignoj, kiuj ofte estas kritikataj. Se oni do uzas je Interlingua, kiel dialekton en normala Esperanta teksto, do au oni lasas la ortografion de Interlingua, kiu ne estas legebla por normala Esperantisto, au oni transkribas vortojn de Interlingua per normalaj Esperantaj literoj. Ĉar la eblecon forigi supersignitajn literojn oni povas uzi, kiam oni volas esprimi, ke en la tradukata libro ekzistas du specoj de ortografio: malnova kaj nova. Kaj ĉar la Zamenhof-propono en multaj kazoj ne estas bona: flughaveno, dishaki, pacharmonio, do oni povas eliri el la origina latina alfabeto kaj aldoni du zeugmojn: A B C Cj D E F G H I J /j/ K L M N O P Q /g R S SJ T U V W /u/ X /h/ Y /j/ Z. Kompreneble tiu propono povas esti same kritikata kiel ĉiuj aliaj, sed klare estas, ke zeugmoj "CJ SJ" ne povas esti alie legataj ol "ĈŜ". Tamen en la resumo pri la gramatiko de Interlingua estas uzita mormala Esperanta literaro:

Aboco: A B C / ĉ k/ CH /k ĉ ŝ/ D DZH /g/ E F G /g ĵ/ H I /i j/ J /ĵ/ K KH /h/ L M N O P PH /f/ QU /ku/ R S /s z/ SH /s/ T TI /cj sj/ TCH /ĉ/ U u /u/ V W /u/ X /ks, kz/ Y /i j/ Z ZH /ĵ/.

Promoncado estas skribita en parentezoj. Akcento estas laŭ la regulo de okcidentalulo sur la vokalo antaŭ lasta konsonanto, sed kun multaj esceptoj. La promoncado parolas pri longaj vokaloj, sed tio ne estas grava por tradukado de dialekto.

Artikolo: LE - difina UN - nedifina

Substantivo: povas fini libervole. Se oni volas esprimi viran sekson, oni aldonas -o, virinan -a. La finaĵoj de pluralo: S, ES. Deklinado: 2.DE /DEL/ j. A /AL/

Adjektivo: ne estas ŝanĝata, finaĵoj plej diversaj. Komparado: 2. plus minus 3. le plus le minus. Ekzistas ek neregula komparado apud regula: parve - minor, minime, magne - major - maksime bon - melior - optime mal - peĵor - pesime.

El adjektivoj povas esti substantivoj per diversaj finaĵoj au ek sen ili. Adverboj derivitaj el adjektivoj per -AMENTE -MENTE, krome neregule: bon - ben /bonmente/ certe - certo /certamente/.

Promomoj:	JO	ME /de mi, al mi, min/	MI	MIE /mia/
	TU	Te	TU	TUE
	ILE	LE /li/	SU	SUE
	ILA	LA	"	"

ILO	IL	-	LO	SE	SU	SUE
NOS			NOS		NO	STRE
VOS			VOS		VO	STRE
ILES			LES	SE	LOR	LORE
ILAS			LAS	"	"	"
ILOS			LOS	"	"	"

ON UNO /oni/

Demandaj kaj relativaj: **KŬI** /kiu/ **KŬE** /kiun, kio, kion/
KŬAL /kiu, kia/ **KŬJE** /kies/

Aliaj estas en la vortaro.

VERBO: en infinitivo: **KREAR VIDER AŬDIE**

as-formo: pronomo + krea vide audi **HABER** /havi/ **HA ESER** =
ES VADER /iri/ **VA** /esti/

is-formo: pronomo+ **KREAVA VIDEVA AŬDIVA**.

Kunmetita formo: estas kreinta, vidinta, aŭdinta; **HA KREATE**,
HA VIDITE, **HA AŬDITE**, estis kreinta, vidinta, audinta: **HA-**
BEVA KREATE, **VIDITE**, **AŬDITE**.

Os-formo: pronomo + **KREARA, VIDERA, AŬDIRA**

Us-formo: **KREAREA, VIDEREA, AŬDIRA**

Participoj: **KREANTE, VIDENTE, AŬDIENTE** - aktiva, pasiva sup-

U-ordono: **KREA! VIDE! AŬDI! KŬE NOS KREA! Estu! SIA!** re

PASIVO: Oni konjugas la verbon **ESER** /esti/ kaj aldonas la
pasivan participon: **JO ES VIDETE** - mi estas vidata /vidita/

La demanda frazo povas esti enkondukita per vorto: **AN, ESKŬE**

Numeraloj:

0 zero	1 un	2 du	3 tres	4 kŭatro	5 cinkŭe
6 seks	7 septe	8 okto	9 nove	10 dece	
11 dece un	dece e un		12 dgece du	dece e du	
20 vinti	30 trenta		40 kuaranta	50 cinkuanta	
60 seksanta	70 septanta		80 oktanta	90 novanta	
100 cento	1000 mile	1000 000	miliono		

1-a pŝime 2-a sekunde 3-a terciĉe 4-a kŭarte
5-a kuinte 6-a sekste 7-a septime 8-a oktave
9-a none 10-a decime 11-a dece-priĉe 12-a dece-sekunde
20-a vinteze 30-a trenteze 40-a kuateze
plue per sufikso **-EZIME** 99-a novanta-nane ultime - lasta

La ordaj numeraloj estas uzataj eĉ kiel nombronoj:

Duono - **MEDIE**, 2/3 **DUO TERCIES** /PARTES/. En tiu kazo:
DUO TERCIE PARTES

Ekzemplo de mallonga teksto:

Okcidental: Un util vacca: "Vu have un bellissim vacca.
Quant litres de lacte it dá vos in un die?" - "Decidu litres".
"E quant litres vu vendi?" - Circa deciott.

Interlingua: Un utile vacca: Vos ha un plus belle vacca.
Quante litros de lacte dona illa in un die? - Dece duo lit-
ros. E quante litros vos vende? - Circa dece octo.

Interlingua skribita per Esperanta literaro /do dialekto/:
Un utile vaka: Vos ha un plu bele vaka. Kuantal litros de lakte
dona ila in un die? - Dece duo litros. E quante litros vos
vende? - Cirka dece okto.

Esperanto: Utila bovino: Vi havas tre belan bovinon. Kiom da
litroj gi donas en unu tago? Dekdu litrojn. - Kaj kiom da lit-
roj vi vendas? - Cirka dek.

Sen supersignoj laŭ Zamenhof: Utila bovino: Vi havas tre be-
lan bovinon. Kiom da litroj ghi donas en unu tago? - Dekdu
litrojn. Kaj kiom da litroj vi vendas? Chirkau dekok.

Sen supersignoj laŭ supra propono: Utila bovino: Vi havas tre
belan bovinon. Kiom da litroj qi donas en unu tago? - Dekdu
litrojn. Kaj kiom da litroj vi vendas? Cjirkaw dekok.

Detlev Elanke

Kiom da Interlingua-anoj?

Fojfoje aperas en revuoj de eksterlando /Ekz. ĈSSR/ artikoloj
pri Interlingua /Gode 1951/ kun la pretendo, ke Interlingua
estas pli tauga kiel lingvo de scienco, estas pli "moderna"
/sen difini kio estas "moderna" en lingvistiko/. Ni ĉi tie
ne traktos la lingvistikan aspekton de Interlingua, sed nur
iom gian socian bazon. La "lingveco" de lingvo dependas ĉefe
de sia lingvoparolantaro. Lingvo sen uzantaro nur ekzistas
kiel historia pasintajo. Filologoj povas priskribi la etrus-
kan lingvon, kiu iam havis uzantojn. Sed, ĉar malaperis la
etruska gento, ties lingvo nun estas lingvo pasinta. La etrus-
ka ne plu funkcias kiel komunikilo - escepte, se du filologoj
decidas lerni kaj ekuzi ĝin.

Interlingua havas limigitan aron da uzantoj. Pri tio informas
i.a. la adresaroj /Adresario de Interlingua/. Mi analizis la
unuam /1964/₁, duan /1975/₂/ kaj kvinan /1985/₃/ eldonon.

La indikojn mi ordigis en jema tabelo:

		Registritaj Interlingua-anoj		
		1964	1975	1985
1	Alĝerio	-	-	1
2	Andoro	-	-	1
3	Argentino	-	-	1
4	Aŭstrio	6	3	1
5	Aŭstralio	2	-	-
6	Belgio	3	2	-
7	Brazilo	-	1	1
8	ĈSSR	23	15	5
9	Danlando	37	28	3
10	Finlando	2	-	-
11	Francio	51	11	6
12	FRG	13	4	1
13	Gabono	1	-	-

14	GDR	4	1	4
15	Grandbritio	42	11	4
16	Hispanio	5	3	0
17	Hungario	-	1	2
18	Irlando	2	-	-
19	Islando	1	-	-
20	Izraelio	1	-	-
21	Italio	11	5	2
22	Japanio	1	-	-
23	Jugoslavio	1	1	-
24	Kanado	5	2	2
25	Kolumbio	-	1	-
26	Meksikio	-	1	-
27	Nederlando	4	7	2
28	Pollando	15	28	4
29	Portugaliao	4	2	-
30	Rumanio	3	9	9
31	Senegalo	1	-	-
32	Soveta Unio	7	5	5
33	Sudafriko	2	-	-
34	Svedio	9	20	3
35	Svisio	17	8	1
36	Usono	121	33	3
<hr/>				
sume: landoj/anoj		29/394	24/202	21/61
		/=100%/	/=51%/	/=15,5%/

Komento:

1. La socia bazo de Interlingua ĝrumpas rapide. Apenaŭ videblas faktoroj kontraŭantaj la srupadon.
2. La ĉefa regiono de la disvasteco de Interlingua estas Eŭropo. Ĉar IALA /International Auxiliary Language Association/ aparte aktivas en Usono kaj tie propagandis Interlingua, ankoraŭ 1964 tie oni registras 121 anojn. Sed jam 1985 restas nur 3 membroj.
3. "Fortaj" eŭropaj landoj 1964 ankoraŭ estis ĈSSR, Danlando, Francio, Grandbritio, Pollando, Svedio kaj Svisio. Sed jam 1985 en tiuj landoj ne plu troviĝas eĉ dek registrigemaj Interlingua-anoj.
4. Tute frapa /sed normala/ estas la fakto, ke oni trovas en la Adresarioj ofte esperantistojn au interlingvistojn, kiuj scipovas Esperanton. En la adresaro de 1985 el la 61 anoj 19 ankau indikas Esperanton kiel korespondan lingvon /= 31,15 %/. De 4 l-a-anoj 1984 en GDR 3 estas aktivaj esperantistoj, membroj de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR.
1964 inter la registritaj Interlinguaanoj i.a. troviĝas Andre Albault, Evgenij A. Bokarev, Detlev Blanke, Jaromír Jermář, Ebbe Vilborg.

Notoj: 1/ Adresario. Union Mundial pro Interlingua, New York 1964, 26 p. 2/ Adresario dtto Beakbergen 1975, 16p. /2a eldono/ 3/ Dto, Odense 1985 /5a eldono/, 8 p.

NIA INFORMADO

Mi volas prezenti kelkajn ideojn pri demonstra propagando, valora metodo por propagando de la pacagado. Bedaŭrinde ekde la jaro 1979 en nia lando ĝstis generale limigitaj propagandaj elspezoj financaj en ĉiuj organizoj inkluzive fabrikoj, entreprenoj kaj ties kluboj. Same Ĉeĥa Esperanto-Asocio ekde la jaro 1980 ĉesis eldonadi portempajn propagandajojn. Sed la porpaca propagando, respektive propagando de la rilatoj inter Esperanto kaj paco ne povas ĉesi malgrau tiuj ĉi cirkonstancoj. En nia lando kaj ankau en aliaj certe aperas multaj altkvalitaj koloraj gazetoj, propagandaj bildaroj, afiŝoj, broŝuroj ktp. Ĉiuj ĉi materialoj estas konvene uzablaj ankau por la Esperanto-movado. Dependas nur de tio, kiel kompletigi tiun ĉi materialon per konvenaj kaj grafike kvalitaj tekstoj pri Esperanto kaj pri ties porpaca utiligo.

Ekzemple: El la jaro 1983 ekzistas bela bildaro en formato A3. Temas pri materialo el Monda asembleo por paco kaj vivo, kontrau nuklea milito. Kompletiginte ĝin per grandlitera surskribo NIA KOMUNA LINGVO ESPERANTO, NIA KOMUNA CELO MONDPACO, ni ricevos bonan kadron por emfazi rolon de Esperanto en la porpaca agado. Samtempe ni kompletigis la materialon per emblemo de la pacrenkontigo en Pardubice kaj per kolora salutsurskribo.

De kelkaj samideanoj mi ricevis informon, ke ili disponas grandan propagandan spacon, sed ili ne scias, kiamaniere plenigi ĝin. Al ili mi volus konsili: Dividu la spacon en du au tri partojn, ornamigotajn unuope. Ekzemple ni en Karlovy Vary dividis nian keston en du partojn, el kiu ĉiu estas plenigata sendepende je la alia. En unu parto ni ofte rememorigas grandajn statpolitikajn arangojn au jubileojn. La alia parto estas poresperanta. Sed ne ŝtikte. Ambau temoj kunligas rolon de la lingvo Esperanto au rilate la jubileon au sendepende au la alian temon. Ekzemple pactemo. Tiel ni akiras sufiĉe da spaco ankau por informado, porinformaj tekstoj, ĉar nuntempe simplaj informoj superas iom demagogian formon de nuraj sloganoj. Tio estas nova rekta direkto por la propagando. Ankau en komerco. Jes, la bruaj sloganoj jam ne estas uzataj; pli da informoj estas uzataj. Simple: la sloganoj ofte tre bruegis, sed fakte nin ne nutris. Kaj tie mi volus emfazi bonan laboron de esperantistoj en Sovet-Unio, kies novaj propagandaj materialoj en Esperanto estas modelaj. Fakte modelaj.

Kaj fine mi deziras denove atentigi pri la alvoko de la informa komisiono de ĈEA. En la alvoko ni petis sendadi al mia adreso ĉiujn konvenajn dokumentojn, fotokopiojn, afiŝojn, flugfoliojn kaj faldfoliojn pri via agado, ankau historiajn, uzablaj por nia tutstata jubilea ekspozicio, preparata por la jaro 1987. Certe la ekspozicio volus emfazi nuntempan cefan rolon de Esperanto, farigi komunikilo de la pacfortoj de la tuta mondo. Mi deziras al vi sukcesojn en via porpaca laboro, speciale en via propaganda laboro por la mondpaco.

Jaroslav Klement.

INTERNACIA ESPERANTO-KURSEJO EN PISANICA
/BULGARIO/

Internacia Esperanto-kursejo /IEK/ estas konstruita en la pitoreska Rodopi-montaro kaj ne estas sezona domo. En IEK okazas kursoj dum la tuta jaro kaj sub la gvido de specialistoj por lernado kaj praktikado de la internacia lingvo. La kursanoj havas eblecon dum mallonga tempo akumuli ricaĵojn.

La tasko de Internacia Esperanto-kursejo estas instrui la internacian lingvon, organizi altnivelajn kursojn, fakajn seminariojn kaj simpoziojn, diverspecajn Esperanto-arangojn. IEK ne estas nur kursejo - ĝi estas ankaŭ feriejo troviganta en la montaĝo - je pli ol 1000 metroj super la marnivelo kaj alloga dum ĉiuj sezonoj de la jaro.

En la kursejo oni studas kvar horojn matene la internacian lingvon kaj posttagmeze estas organizitaj ekskursoj al urbo Smoljan kaj planedario, al Pamporovo kaj montopinto Snežanka, al arkitektura kaj etnografia rezervejo en vilaĝo Mogilica, tuttaga ekskurso al la groto "Gorgo de l' Diablo" - apud urbo Trigrad, sportaj ludoj, projekciado de diafilmoj kaj esperantlingvaj filmoj, gajaj vesperoj, interkona kaj adiaŭa vesperoj, prelegoj kaj multaj aliaj...

Vojaĝante al la Internacia Esperanto-kursejo kaj reen la grupoj havas la eblecon trapasi diversajn urbojn tra Bulgario: Plovdiv - la malmova parto de la urbo, monaĥejon Backovo, Ruse - la riveron Danubo kaj la ponton de la amikeco, Veliko Tarnovo - la antikvan pitoreskan urbon, la lokon de la somera esperantista universitato, Varna - la belegan someran ĉefurbon de Bulgario, Balĉik, Tolbuhin ktp.

Internacia Esperanto-kursejo en la pitoreska vilaĝeto Pisanica estas moderna hotelo kun 210 litoj en du-, tri- kaj ses-litaj ĉambroj kun banejoj kaj necesejoj, daŭre fluanta varma kaj malvarma akvo, klasĉambroj kaj biblioteko. En la restoracio oni povas ĝui bongustajn specialajn manĝojn de la bulgara kuirarto kaj kune kun la baro kaj diskoteko proponas komfortan kaj agrablan restadon.

En la jaro 1985 okazis tie Kurso por ekskursgvidantoj, Kurso por infanoj, Printempa Esperanto-renkontiĝo, Renkontiĝo de agrikulturaj specialistoj - esperantistoj, Kurso por junaj tradukistoj, Renkontiĝo de fervojistoj-esperantistoj, Internacia Esperanto-sakseminario, Tradiciaj 20-tagaj kursoj por instruistoj, Internacia pionira Esperanto-arango, Korusa Esperanto-renkontiĝo, Internacia simpozio "Esperanto en la internacia turismo", Renkontiĝo de esperantistoj-pentristoj, Internacia festivalo de kino kaj foto-amatoroj-esperantistoj, Ĉarmaj Rodopi", Internacia renkontiĝo de dancensembloj, Internacia junulara seminario, Renkontiĝo okaze de studenta festo, Novjara esperantista feriado kaj aliaj. Ekzemple dum la tuta jaro Dusemajnaj kursoj, Revuo de la esperantista po-

ezio kaj kanto, Recitalo de Botew-poezio kaj simila revolucia poezio, Somera Esperanto-universitato k.a.

Se vi volas pasigi agrablajn tagojn en Pisanica, informigu ĉe: Internacia Esperanto-Kursejo, 1090 Sofio P.K.791 Bulgario.



NIA POLITIKA KAJ KULTURA LABORO EN LA JARO 1986

La proksimiĝanta 1986-a jaro estas multrilate grava kaj pretendema por aktivado de nia tuta movado, de la landa asocio, ĝiaj sekcioj kaj komisionoj, de la lokaj grupoj kaj de unuopaj esperantistoj:

- en la internacia skalo ĝi estos la Internacia Jaro de la Paco - lau decido de UNO kaj akorde kun la sopiroj de la homaro,
- en la enlanda skalo ĝi estos jaro de la XVII-a kongreso de Komunisto Partio de Ĉeĥoslovakio kaj de la balotoj por la reprezentaj organoj de nia lando,
- por nia movado ĝi estos la lasta jaro antaŭ la granda jubileo de Esperanto. Ĝi estos jaro de disvolvigo de nia agado, de la plej diversaj formoj de nia informa kaj verba laboro.

1986 - La Internacia Jaro de la Paco

En la kunsido de la Ĝenerala Asembleo de UNO en la jaro 1983 estis la jaro 1986 proklamita la Internacia Jaro de la Paco. Ĝiaj ĉefaj celoj estas la jenaj:

1. Instigado de komunaj kaj efikaj aktivecoj de UNO, de ŝtatoj-membroj, de interŝtataj organizaĵoj, de neŝtataj organizaĵoj, de edukaj kaj kulturaj instancoj, de altlernejoj kaj de amaskomunikiloj por apogo de la paco surbaze de Ĉarto de UNO.
2. Plifortigado de UNO kiel la plej grava internacia sistemo, kiu dediĉas sin al la subteno kaj defendo de la paco.
3. Atentigo al formado de bazaj premisoj por la paco en la nuntempa mondo kaj perado de inicioj, precipe al la paco, kiel la premo de disvolvigo kaj socia progreso, sekureco, nacia sendependeco kaj justeco, al senarmigo kaj forigo de nuklea katastrofo kiel de esencaj fundamentoj de la paco.

Kiel emfazis la partoprenantoj de la kunsido de la estraro de MPK, kiu okazis en Moskvo de la 22-a ĝis la 25-a de marto 1985, en la aktivecon al la Internacia Jaro de la Paco diversforme aligos ankaŭ la MPK, la pac-kaj kontraumilit-movadoj, organizejoj kaj grupoj de la tuta mondo.

Tiamaniere ili volas kontribui al plenumiĝo de teksto de la dokumento de ĜA UNO, kiu i.a. tekstas: "... Jaro 1986 ankoraŭ ne estas la jaro, en kiu ĉie regos la paco. Sed ĝi devas esti la jaro de aktivecoj por la paco kaj de serioza pensado pri la esenco de la paco kaj pri la kondiĉoj necesaj por la paco ...".

POLITIKAJ KAJ KULTURAJ JUBILEOJ EN LA UNUA DUONO DE 1986

La suba listo tute ne estas kompleta, ĝi entenas nur kelkajn plej gravajn datrevenojn, kiuj povus esti instigo por klubvesperoj de lokaj grupoj.

Januaro:

- 1.1. Nova Jaro
- 7.1. Ŝtata festo de Kampuĉia Popola Respubliko
- 21.1. 1924 - morto de V.I.Lenin /62 jaroj/
- 27.1. 1756 - naskiĝis Wolfgang Amadeus Mozart /230 jaroj, 11 mortis 5.12.1791/

Februaro:

- 5.2.1836 naskiĝis Nikolaĵ Aleksandroviĉ Dobroljubov/150j./
- 16. - 22.2. Semajmo de Internacia Amikeco
- 21.2. Internacia Tago de Batalo kontraŭ la Koloniismo
- 25.2. Venko de la laboranta popolo en Ĉeĥoslovakio /1948/
- 27.2.1976 mortis Kolomano Kalocsay /10 jaroj/

Marto:

- Monato de Libro
- 1.3. Internacia Tago de Batalo kontraŭ nukleaj armiloj /usona H-bombo sur Bikini en 1954/
- 7.3.1946 mortis Henrik Adamson /40 jaroj/
- 8.3. Internacia Tago de Virinoj: Tago de aktivecoj de virinoj por la paco kaj senarmigo
- 11.3.1971 mortis Evgenij A.Bokarev /15 jaroj/
- 20.3.1921 naskiĝis Amadou-Mahtar M. Bow, direktoro de UNESCO /65j./
- 21. - 27.3. Internacia semajmo de solidareco kun la nacioj batalantaj kontraŭ rasismo kaj rasa diskriminacio
- 23.3. Tutmonda Meteorologia Tago
- 23.3.1901 naskiĝis Jan Sverma /85 jaroj/
- 28.3. Tago de Instruistoj; en 1592 naskiĝis J.A.Komenský
- 29.3.1926 mortis Albert Skarvan /60 jaroj/
- 30. - 31.3. Pasko

Aprilo:

- 4.4. Ŝtata festo de Hungara Popola Respubliko
- 4.4. Tago de Esperantaj Radio-dissendoj; en 1959 komencis elsendi Radio Polonia en Esperanto
- 4.4. 1911 naskiĝis Václav Čtvrtek /75 jaroj/
- 5. - 12.4. Semajmo de Azio
- 5.4.1906 naskiĝis Vincenc Havel, skulptisto-esperantisto /80j./

- 7.4. Tutmonda Tago de Sano
 8.4.1936 mortis Božena Benešová /50 jaroj/
 10.4.1961 mortis Louis Bastien /25 jaroj/
 11.4. Tago de Internacia Solidareco de liberigitaj politi-
 kaj arestuloj kaj batalantoj kontraŭ fasismo; libe-
 rigo de Buchenwald en 1945
 11.4.1916 mortis Theophile Rousseau /70 jaroj/
 12.4. La unua flugo en la kosmon; Gagarin en ŝipo Vostok
 en 1961 /25 jaroj/
 14.4.1917 morto de L.L.Zamenhof
 16.4.1886 naskiĝis Ernst Thälmann /100 jaroj/
 18.4. Internacia Tago de memorejoj kaj historiaj lokoj
 22.4. naskigo de V.I.Lenin /1870/
 24.4. Internacia Tago de Solidareco de Junularo
 25.4.1886 naskiĝis Jindřich Hořejší /100 jaroj/
 28.4. Tutmonda Tago de Fratigintaj Urboj

Majo:

- 1.5. Festo de Laboro
 3. - 9.5. Semajmo de Aktivecoj por la Eŭropa sekureco kaj
 kunlaboro
 5.5.1945 La Praga Insurekcio
 7.5.1961 mortis E.Faulhaber-Čížková /25 jaroj/
 9.5. Ŝtata Festo de Ĉeĥoslovakio, Liberigo de Ĉeĥoslovakio
 fare de la Soveta Armeo /1945/
 11.5.1896 naskiĝis Hilda Dresen /90 jaroj/
 14.-16.5.1921 - konstitua kongreso de Komunista Partio de Ĉe-
 ĥoslovakio /65 jaroj/
 21.5.1931 mortis Theophile Cart /55 jaroj/
 23.5.1906 mortis Henrik Ibsen /80 jaroj/
 23.5.1966 mortis Eduard Kühnl /20 jaroj/
 25.5. Tago de Afrika Libereco /fondita Organizaĵo de Afrika
 Unueco en 1963/
 25. - 31.5. Semajmo de Solidareco kun la popolo de la bata-
 lanta Afriko
 29.5.1911 naskiĝis Josef Víték /75 jaroj/

Junio:

- 1.6. Internacia Tago de Infanoj
 4.6. Internacia Tago de senkulpaj infanaj viktimoj de agre-
 so /izraela agreso kontraŭ Libanon en 1982/
 5.6. Tutmonda Tago de la Vivmedio
 10.6.1942 ekstermo de Lidice
 18.6.1936 mortis Maksim Gorkij /50 jaroj/
 19.6.1886 naskiĝis Rudolf Kremlička /100 jaroj/
 22.6.1956 mortis Václav Rezáč /30 jaroj/
 24.6.1942 ekstermo de Ležáky
 25.6.1956 mortis Eduard Štorch /30 jaroj/
 28.6.1971 mortis nacia artisto Martin Benka /15 jaroj/

Esperantistoj ofte revas pri la fina venko, pri la ĝenerala akcepto de la Internacia Lingvo Esperanto en la tuta mondo, de ĉiuj registaroj kaj internaciaj organizaĵoj. Sed tiu ĉi fina venko ŝajnas esti tre fora, ĝi kvazaŭ neniam proksimiĝis dum la preskaŭ centjara ekzisto de la lingvo. Tamen ni ne estu tro pesimismaj. Ekzistas ja tamen okazoj, kiam Esperanto estas akceptita de internacia aŭ nacia organizaĵo kaj uzata por la celoj de tiu ĉi organizaĵo. Komprenu: ĝi estas uzata de neesperantista organizaĵo. Ekzemple, kiam iu fremdultrafika oficejo aperigas prospekton en Esperanto, aŭ kiam la ŝtata fervojo uzas Esperanton en veturhoraro, aŭ kiam UNO eldonas la Deklaracion pri la homaj rajtoj kaj aliajn dokumentojn en Esperanto, aŭ kiam la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj eldonas sian oficialan revuon en Esperanto ktp. Ĉio ĉi estas ekzemploj de la uzado de Esperanto fare de neesperantista organizaĵo. Ĉiu el tiuj ĉi ekzemploj prezentas malgrandan ŝtupon al la fina venko. Evidente la fina venko ne venos subite, tuj en la tuta mondo, sed malrapide, postepe /aŭ pogute, se vi volas/, en diversaj landoj kaj en diversaj sferoj de la homa aktiveco.

Estas sendiskute, ke al la plej gravaj sukcesoj, aŭ ŝtupoj al la fina venko, kiujn Esperanto ĝis nun atingis, estas la akcepto de Esperanto en la oficialajn programojn de iuj radiostacioj. La fakto, ke iuj ŝtataj disaŭdigejoj uzas la Internacian Lingvon tute normale apud aliaj lingvoj, signifas rekonon por Esperanto, signifas veran proksimiĝon al nia fina celo.

Esperantistoj povas esperi, ke la fina venko iam venos. Sed nur esperi ne sufiĉas, ĉe se ni estas esperantistoj. Por atingi la finan venkon necesas agi. Kaj ĝuste la uzo de Esperanto en diverslandaj radiodisaŭdigoj prezentas vaŝtan kampon por aktiveco de la esperantistaro. Ĉar ne sufiĉas kontentigi, ke la disaŭdigoj ekzistas; necesas ĉiam subteni la staciojn, multe korespondi al ili kaj tiamaniere pruvi, ke la esperantlingvaj disaŭdigoj estas auskultataj kaj estas bezonataj. Ĉiam ja minacas la danĝero, ke la elsendoj povas ĉesi, se ili ne havos sufiĉan reŝon. Kaj tiun tristan eventon ni neniam plu devas permesi!

Kontraŭe, per multnombra kaj amasa korespondado ni ne nur subtenas kaj helpas la esperantlingvajn disendojn, sed ni pruvas ankaŭ niajn fortojn kaj kapablojn. Oni tre ofte demandas, kiom da esperantistoj ekzistas kaj oni ĝenerale opinias, ke Esperanto estas nur malgranda, negrava, flankalingvo. Kaj tamen ĝuste per korespondado al la stacioj, uzantaj Esperanton, ni povas montri kaj ni vere montras, ke Esperanto ne estas tiom malforta kaj sensignifa, kiel iuj opinias.

Ĉu vi opinias, ke Radio Polonia dissendas ĉiutage ses programojn en Esperanto nur pro ia pietato por Zamenhof? Ne, tute ne. Unu el la ĉefaj kauzoj de la vasta uzo de Esperanto en la Varsovia radio estas la amasa subteno de la Esperanto-dissendoj el Varsovio fare de la esperantistaro. Imagu: en la jaro 1984 Radio Polonia ricevis entute 43 130 korespondadojn, el ili 10 235 korespondadoj estis reeĉo al la germanlingvaj elsendoj de Radio Polonia, tuj poste sekvis la korespondadoj por la esperantlingvaj elsendoj - 9 918, kaj nur poste lamis korespondadoj angla-, franc- kaj pollingvaj - ĉiu en kvanto de 4000 ĝis 4500. Tute malantaŭe restis la lingvoj itala, hispana, araba k.a. Sekve, dank al aktiveco kaj laboremo de esperantistoj Esperanto por Radio Polonia tute ne estas sensignifa flanko lingvo, sed la graveco la dua lingvo tuj post la germana kaj antaŭ la angla kaj franca.

Aŭ ni rigardu alian ekzemplon. En junio 1984 la Svisa Radio Internacia /SRI/ ricevis entute 1398 korespondadojn, el ili 36 esperantlingvaj /t.e. 2,4%/. La esperantlingvaj korespondadoj estis evidente malmultaj, se ni komparas ilin kun la nombro de korespondadoj anglaj /32,4%/, portugaliaj 21,1%/, germanaj /11,9%/, arabaj /9,8%/, hispanaj /8,4%/, francaj /8,0%/, kaj italiaj /5,5%/. Ankaŭ en la ceteraj monatoj la procento de la esperantlingvaj korespondadoj estis simila /en julio 1,7%, en aŭgusto 2,7%, en septembro 1,5% ktp./, sed se ni konscias, ke anglalingve, portugallingve, germanlingve ktp SRI elsendas ĉiutage dum kelkaj horoj kaj por ĉiuj kontinentoj, dum esperantlingve oni elsendis nur por Eŭropo nur dum tri tagoj semajne dufoje dekminutan programon, tiam estas klare, ke la Esperanta procento konsiderinde superas eĉ la anglalingvan procenton! Tion finfine ekkonsciis ankaŭ la estraro de SRI kaj enkondukis Esperanton ankaŭ en la programon por la ekstereuropaj kontinentoj /eĉ se oni samtempe reduktis la europajn esperantlingvajn programojn/. Tiun faktan ni povas konsideri kiel plian rekonon de Esperanto flanke de la direktoraro de SRI kaj sekve pluan sukceson por la Internacia Lingvo. Sukceson, kiun atingis la esperantistoj mem per sia laboro.

Nu kaj por la tria fojo mi menciis alian progreson. Radio Vieno plilongigis siajn esperantlingvajn programojn al kompleta kvaronhoro. Do de 12 minutoj al 15 minutoj. Eble la tri pliaj minutoj saĝnas al vi bagatelaj, sed ne forgesu, ke ili prezentas 25 % de la origina elsendotempo. Do la esperantaj programoj de Vieno plilongigis je 25 % dank al persista laboro de la esperantistaro.

Esperanto ne estas sensignifa, negrava, margena lingvo. Ĝi estas grava lingvo kaj la mondo tion fine rekonos. Sed jam nun ni povas multe kontribui al tio. Ne per esparado, sed per laborado. La Esperanto-movado estas forta movado, ĉar ĝi estas internacia movado. Mi pruvu miajn fortojn! Kaj ne nur ĉe radiostacioj.

J.Patera

KLUBA VIVO

N Á C H O D :

La esperantistoj el Náchod renkontigis la 15-an de junio kun siaj polaj amikoj sur la supro de Negmonto, la plej alta monto en Bohemio. La renkontigo havis titolon "Pado de amikeco" kaj oni akceptis jenan proklamon: "Ni partoprenantoj de la renkontigo de esperantistoj sur Negmonto esprimas ideon, ke mia kŝmuna paŝo sur "Pado de amikeco" farigos fundamento por daŭra kunlaboro inter niaj Esperanto-kluboj. Ni kredas, ke "Pado de amikeco" estas unu el vojoj al daŭra paco." Subskribis 30 esperantistoj el urboj Walbrzych, Jelenia Gora, Trutnov kaj Jaroměř.

K.Str.

P R A H A :

La Esperanto Klubo aranĝis siajn regulajn ĉiusemajnajn kunvenojn ankaŭ somere dum la libertempoj. Kvankam por julio kaj aŭgusto estis fiksita neniu programo por la kunvenoj, tamen la kunvenoj estis ĉiam interesaj. Grandparte kontribuis al tio ankaŭ la eksterlandaj gesamideanoj, kiuj venas en la klubon kaj ofte tre interese rakontas pri siaj landoj. Lastatempe la klubon vizitis gesanoj el Nederlando, Japanio, GDR kaj Hungario, sed venas ankaŭ ĉeĥoslovakaj gesamideanoj el diversaj lokoj de la lando. La Praga Klubo kunvenas regule ĉiulunde en Zahradní Město, en Malinová-str. n-ro 25 /la kunveno estas inter la 18,30 kaj 20.00 h./

Š U M P E R K :

Tradicia maja Esperanto-renkontigo en banloko Velké Losiny, kiun partoprenis 35 ĉeestintoj, finis la laborjaron de nia Esperanto-klubo. Dum tiu ĉi jaro ni preparis la ekspozicion en kunlaboro kun la Domo de kulturo en Šumperk sub la titolo "Esperanto - jazyk dorozumění", kie estis ekspoziciataj la donacetoj de niaj eksterlandaj amikoj.

Plue estis aranĝitaj kvar prelegoj kun diapozitivoj, nome pri Malto, Nigra-maraj havenoj, Meza Azio kaj Portoriko.

En forĵetatejon estis transdonitaj 245 kg de fero, 280 kg de papero, 14 kg de kuracplantoj kaj 35 kuniklo-feloj. La ge-klubanoj forlabis ĉe rekonstruado de la esperantista turista domo en Bor 173 brigadhorojn.

La EK kunlaboras kun la Distrikta Pac-Konsilantaro en Šumperk. Okaze de plenkunsido de DPK la prezidanto de la klubo s-ano Otta referis pri la pac-laboro de esperantistoj en la mondo. La referaĵon li finis per alvoko el la ferma dokumento de konferenco en Helsinki.

M.

Výtvarná řemesla
 Praha
 Vám nabízejí široký
 sortiment bytových
 doplňků a dárkových
 a upomínkových
 předmětů,
 vyráběných převážně
 v malých sériích
 s častou inovací.

NABÍZÍME:

SOUSTRUŽENÉ MOCCA SOUPRAVY
 SOUSTRUŽENÉ ODKLÁDACÍ STOLKY
 MALOVANÉ PORCELÁNOVÉ SOUPRAVY
 I JEDNOTLIVÉ KUSY
 MALOVANÉ A BROUŠENÉ VÁZY, MÍSY
 A POPELNÍKY

VÝROBKY Z ČINU
 BIŽUTERII KOVOVOU A KOŽENOU
 A DALŠÍ SORTIMENT Z KOVU, KOŽE,
 KOŽENKY A TEXTILU

Adresy prodejen upomínkových a dárkových předmětů:

110 00 Praha 1, Národní tř. 37	22 41 94
110 00 Praha 1, Vodňáckova 28	24 47 71
110 00 Praha 1, Spálená 39	29 27 04
110 00 Praha 1, Na poříčí 35	23 17 315
110 00 Praha 1, Křížovnické nám. 2	26 63 28
120 00 Praha 2, Anglická 18	25 98 56
110 00 Praha 1, Lazarská 5	29 83 22
110 00 Praha 1, Železná 12	22 79 14
170 00 Praha 7, Obránců míru 17	37 44 84
110 00 Praha 1, Můstek – stanice metra	26 14 19
360 00 Karlovy Vary, Mariánská 2	930/28 381

V našich prodejnách
 naleznete
 vhodné dárky
 pro každou příležitost.
 Naše pracovníce Vás
 ochotně obslouží
 a pomohou vybrat
 předmět,
 který potěší.

Vzorkovna nábytku:

110 00 Praha 1, Václavské nám. 41	26 40 64
-----------------------------------	----------

přijímá objednávky na individuální zakázky
 nábytku a bytových doplňků.

**Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979